der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR

21. Jahrgang Nr. 132 (4/1985) ISSN 001 4-0619 30 Pf

PROKLAMO

La VII-an renkontiĝon de pacdefendantoj en la tagoj 29. — 31. 3. 1985 en Pardubice, Ĉeĥoslovakio, partoprenis esperantistoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Francio, Kanado, Hungario, Germana Demokratia Respubliko, Aŭstrio kaj Sovetunio kaj civitanoj el Pardubice. La partoprenantoj je fino de la traktado konstatis, ke malgraŭ la strebado de la absoluta plejparto da homoj sur nia planedo pri konservado de la paco plu daŭras armadkonkurado, elvokata de la agresema internacia politiko de reakciaj rondoj far reganta milit-industria komplekso de Usono, kiu klopodante akiri ne limigitan influon super nia tuta planedo, strebas pri

— atingo de supereco en ĉiaspecaj armiloj kaj por ilia dislokigo misuzi ankaŭ la kosman spacon,
— plua modernigo de armiloj kemiaj, bakteriologiaj kaj biologiaj kun la celo plialtigi ilian detruan efikecon,
— ekflamigo de lokaj militoj helpe de ŝovinismaj, revenĝismaj kaj novnaziaj movadoj.

La portoprenantojn konsternas la fakto, ke Usono kaj pluaj nukleaj grandpotencoj ignoras la devontigon de Unio de Sovetiaj Socialismaj Respublikoj, ne uzi nuklean armilon kiel la unua, same la inviton, ke ili anonciĝu al ĉi tiu devoligo.

La partoprenantoj de la renkontiĝo tial alvokas la esperantistojn de la tuta mondo, ke sian strebadon ili direktu kontraŭ la iniciatantoj de la nuklea, kemia, bakteriologia kaj biologia armadoj kaj kontraŭ la misuzo de la kosmo por la realigo de iliaj mondaj hegemoniaj celoj.

La partoprenantoj plene subtenas la alvokojn de la prezidio de Monda Packonsilio en Moskvo de 25. 3. 1985 nome:

„La jaro de la 40-a datreveno de la venko super la faŝismo iĝu la jaro de la venko super la minaco de nuklea milito kaj ne al la stelaj militoj!“ kaj alvokas la esperantistojn plenumi la fiksitajn en ili taskojn kaj agad-konceptojn.

La partoprenantoj de la renkontiĝo turnas sin al ĉiuj esperantistoj, kies komunikilo Esperanto servas al pli bona interkompreniĝo kaj kunlaboro inter la popoloj, ke ili pli intense uzu la lingvajn kaj movadajn rimedojn por plua interfratiĝo, kultura interŝanĝo, protekto de homa medio kaj por pli profundaj kontaktoj inter la homoj cele helpi tiel al plifirmigo de pacaj ideoj.

Pardubice, Ĉeĥoslovakio,
la 30-an de marto 1985

La PARTOPRENANTOJ de la VII-a
REKONTIGO DE PACDEFENDANTOJ
en Pardubice

La VII-a renkontigo de pacdefendantoj en Pardubice

La esperanto-rondeto ĉe DK RSM DUKLA organizis la 29. — 31. 3. 1985 sub aŭspicio de DPK la VII-an internacian renkontiĝon de pacdefendantoj en Pardubice. Partoprenis ĝin pli ol 400 esperantistoj el Eŭropo kaj unu gasto el Kanado.

La programo estis abunda. Ĝi komenciĝis vendrede la 29. 3. 1985 per akcepto en la urbdomo, poste ĉiuj vizitis la memorlokon Zámeček, kie ili aŭskultis prelegon pri la tragika historio kaj metis florojn ĉe la memorŝtono. Posttagmeze la esperantistoj vizitis tri pardubicajn entreprenojn — TMS, TVAR kaj bierfabrikon. En ĉiuj oni havis eblecon interbabili kun laboristoj kaj oficistoj. Vespere okazis kulturprogramo. Oni vidis ĵaz-dancon, aŭskultis monologon de Eva Seemannová, popolkantojn kaj la himnon PACO de Miroslav Smyčka, akordeonistojn kaj fine la folkloran ensemblon LIPKA. Post la programo ludis al dancado la muzikgrupo Barbuloj.

Sabate je la 9-a horo oni inaŭguris la solenan kunsidon de la pacdefendantoj per packanto de la Barbuloj. Kvin pionirinoj, kiuj lernas Esperanton, deklamis la versojn de Jiří Kořínek „Infanoj vokas" kaj poste disdonis florojn al la prezidantaro.

Poste la prezidanto de ČEA D-ro Jaromír Jermář, CSc, bonvenigis la ĉeestantaron, nome li salutis la urbestron k-don Jaroslav Šimon, la prezidanton de DPK docenton MUDr-on Jiří Kovář, CSc, la prezidanton de MEM d-ron Imre Pethes, la reprezentanton de Slovakaj esperantistoj d-ron Fr. Šatura kaj esperantistojn el Aŭstrio, Bulgario, Francio, GDR, Kanado, Hungario kaj Sovet-Unio. Ĉijare la nombro de la partoprenantoj estis limigita depende de la loĝeblecoj.

Kiel unua alparolis la ĉeestantojn la urbestro Jaroslav Šimon. Li substrekis, ke la VII-a pacrenkontiĝo okazas en la jaro de 40-a datreveno de la malvenko de la germana faŝismo. Dum la dua mondmilito pereis en la kontraŭfaŝisma koalicio 31 milionoj da homoj, el tio 20 milionoj da sovetianoj. Nia respubliko perdis 360 mil da homoj. Sovet-Unio daŭre venas kun iniciativaj pac-proponoj, sed tiuj estas de Usono pretervidataj aŭ rifuzataj. Usono daŭre gradigas febran armadon kaj en la nuntempo ĝi strebas pri ekrego de la kosmo per novaj armiloj.

La prezidanto de DPK docento Jiří Kovář, laŭprofesie estro de kirurgia fako de malsanulejo, parolis pri siaj spertoj el la dua mondmilito kaj el la kroea milito, kiam en la urbo Kesong li kuracis kaj flegis 2 000 georfojn. Li diris, ke Eŭropo dum la lastaj 40 jaroj ne travivis militan furiozadon dank' al Sovet-Unio kaj aliaj socialismaj ŝtatoj. Kiu nur teorie konatiĝas kun la pensoj de la socialisma ideologio, devas mem alveni al la konvinko, ke la feliĉon de homoj eblas konstruadi nur dum paco.

La prezidanto de MEM d-ro Imre Pethes diris: „Ĉiu progresema homo deziras kreadi en pacaj vivcirkonstancoj kaj vivi en amikeco. Sed malgraŭ porpacaj klopodoj aktiviĝas fortoj starantaj kontraŭ mildiĝo. La daŭrigo de vetarmado danĝerigas la pacon kaj internacian sekurecon. — Sed ni, esperantistoj, estas optimistoj, ni komune pliaktivigos la klopodojn por defendo de la paco kaj ni solenos la centjaran jubileon de Esperanto en paco!" — D-ro Pethes solene transdonis la honorinsignojn de MEM por longjara porpaca laboro al s-ino Eva Seemannová kaj al s-ro Karel Franc.

La franco Pierre Jouvin salutis la Packonferencon en la nomo de francaj kaj belgaj pacdefendantoj-esperantistoj.

La delegito de GDR, s-ano Hans-Jürg Kelpin, parolis pri la 40-a datreveno de la fino de la dua mondmilito, kiu signifis komencon de nova feliĉa vivo en GDR. — Fine li honorigis la estintan sekretarion de ČEA s-anon Zdenko Křimský per la honorinsigno de Asocio de esperantistoj de GDR por lia

meritplena konstruktiva laboro por interfratiĝo de ambaŭ nacioj kaj por kunlaboro ankaŭ en venontaj jaroj.

La delegito de ASE kaj vicprezidanto de MEM k-do Dmitrij Aleksandrovič Perevalov rakontis pri la porpaca laboro de sovetiaj esperantistoj kaj pri novaj esperantlingvaj broŝuroj, kiuj estis eldonitaj en la pasinta jaro. Ĉijare efektiviĝos en Moskvo la Monda Festivalo de Junularo. Estas dezirinde, ke en ĉiu nacia delegacio estu ankaŭ junaj esperantistoj, kiel i. a. faris Hungario. [Al tio menciis d-ro Jermář, ke la prezidantino de la junulara sekcio de ĈEA, Máša Vančurová, estas ano de la preparkomitato por Moskvo.]

La hungara delegito Sandor Jakab voĉlegis mesaĝon de la Hungara Packonsilio.

La bulgara delegitino Veneta Baleva, redaktorino de PACO, diris, ke ni ne darfas atendi ĝis kiam venos apokalipso, tiam estos jam malfrue por pacdefendo. Hodiaŭ ankoraŭ estas ĉielo blua kaj akvo pura. Ni tuj luktu por la paco!

La prezidanto de la paca sekcio de ĈEA s-ano Drahomir Kočvara parolis pri la porpaca laboro en kelkaj lastaj jaroj, pri abonado de gazeto Paco kaj ankaŭ pri tio, ke estas necese labori tiel, por ke la tuta ĈEA ricevu la honortitolon „ĈEA de pacdefendantoj."

Posttagmeze efektiviĝis pacdialogoj kaj fine estis per ĉiuj voĉoj aprobita Proklamo al ĉiuj esperantistoj de la mondo.

Interese diskutis junaj partoprenantoj el GDR, p.e. lige al pasintjaraj paroloj de FRG-anoj unu el ili diris: „El armado en socialismaj landoj neniu profitas. Sed en kapitalismaj landoj tio signifas grandan profiton, 10-oble eĉ 100-oble pli grandan ol se oni produktas ordinaran varon. — Estas unu nura vojo por sekurigi la pacon: Multe labori. Se socialismaj ŝtatoj estos ekonomie fortaj, ili povos la pacon eldevigi."

La dua GDR-ano rakontis, ke en okcidenta televido oni povas vidi Reagan kaj Kohl kiel grandaj pacamikoj. Duaflanke la sama Kohl subtenas revenĝistojn kaj landsmanŝaftojn en FRG. Al ĵurnalistoj respondis Franz Josef Strauss: „La 9-a majo 1945 signifis finon de milito, tio estis bona afero. La malbona esti, ke ĝi signifis malvenkon de Germanio. Tial ni ne havas kaŭzon por solenaĵo." La juna esperantisto demandas: „Ĉu post venko de sovetianoj sinjoro Strauss dezirus, ke restu en Germanio faŝismo?"

Interese ankaŭ diskutis tri aŭstrianoj. Franz Schick, redaktoro de Internaciisto, parolis pri KEK /Kolektivo de esperantistaj komunistoj/, posteulo de IPE. Li atentis ankaŭ pri la neceso varbi novajn junajn geesperantistojn, ĉar en la gisnunaj vicoj superregas la pliaĝuloj. Li kritikis la aŭstrian registaron, ke ĝi kunlaboras kun Usono.

Rudolf Jax diris, ke okcidentuloj estas misinformitaj per amasmedioj kaj li rekomendis multe korespondi kun okcidentaj esperantistoj kaj klarigi al ili la veron pri vivo en socialismaj landoj.

Ernest Quietensky menciis, ke kiel Usono fajfas, tiel la aŭstria registaro saltas. La juna generacio kun ĝisnuna politiko ne konsentas.

Sabate vespere estis esperantista balo kun antaŭdanco kaj riĉa tombolo, kies gajno estos sendita al la fonduso de paco kaj solidareco.

Dimanĉe matene forveturis kvar aŭtobusoj kun la kongresanoj al Ležáky, kie oni metis florojn en la memorejo al cindrourno de la viktimoj de faŝisma okupacio. Reenvoje oni vizitis vilaĝmuzeon Vysočina kaj la kastelon Nové Hrady.

Okaze de la VII-a pacrenkontiĝo estis aranĝita ekspozicio de kontraŭmilitaj desegnaĵoj de Pavel RAK en la kinejo SVĚT. En DK DUKLA estis ekspozicio de infandesegnaĵoj.

La VII-a renkontiĝo de pacdfendantoj finiĝis kaj dependas de partoprenantoj diri, ĉu ili estis kontentaj kaj ĉu la traktado pri paco estis sukcesplena.

Milada Hemerková

18a Konsultiĝo en Bulgario

La ĉiujare okazantaj konsultiĝoj de Esperanto-organizaĵoj el socialismaj landoj jam havas longan tradicion. (Vidu la apudan liston.) Ili havas la celon servi por spertinterŝanĝo inter la partoprenantaj asocioj kaj pridiskuti la vojojn kaj rimedojn por ankoraŭ pli efike agadi pere de Esperanto por paco kaj socialismo. La 18a Konsultiĝo okazis de 15. — 20. 4. 1985 en la rave bela Internacia Esperanto-Lernejo Pisanica, en la ĉarma Rodopi-montaro. La gastigantoj faris grandegajn fortostrecojn por sukcesigi la Konsultiĝon. Aparte oni rekonstruis partojn de la domo en Pisanica, inaŭguris luksan konferencan salonon, rearanĝis la manĝejon, la bibliotekon kaj la baron (jes, ankaŭ ĝin).
La 18a estis la ĝis nun plej internacia. Ĉar portoprenis reprezentantoj de entute 10 asocioj (vidu la komunikaĵon). Aparte ĝojiga estis la fakto, ke unuan fojon partoprenis Konsultiĝon reprezentanto de Kuba Esperanto-Asocio, nome ties vicprezidanto kaj ĉefinstruisto Andreo Piñero Prieto el Havano. Nia Kuba kamarado ĉarmis siajn alilandajn kolegojn per sia granda entuziasmo, informiteco, konstruiva scivolemo kaj klara politika konscio. Antaŭ internacia ekzamena komisiono Andreo sukcesis la ekzamenon de BEA en la tria grado. Fakte tio estis nur pli formala afero, ĉar li perfekte kaj flue regas la lingvon, tre bone konscrias pri diversaj aspektoj de la metodiko de Esperanto-instruado kaj havas atentindajn esperantologiajn sciojn.
La partoprenintoj estis akceptitaj de prezidanto de la Distrikta Komununa Estraro de la impete evoluanta distrikto Smoljan, vizitis la konatan vintran ripozejon Pamporovo kaj renkontiĝis kun esperantistoj el Smoljan. Dum libera vespero la gastigantoj montris du kolorajn fimlojn pri Esperanto, unu profesie faritan televidan kaj unu amatoran pri la IFEF-kongreso 1984 en Burgas/Bulgario. La delegitaro de GDREA konsistis el ties prezidanto Hans Heinel, la sekretario d-ro Detlev Blanke kaj Michael Lennartz.

Aparte gravaj temoj de la Konsultiĝo estis la kunlaboro de la Esperanto-asocioj kun neesperantistaj amasaj organizaĵoj kaj la pripariĝo de esperantistoj por partopreni la mondan festivalon ĉi-jare en Moskvo. La 19a Konsultiĝo okazos 1986 en Poprad/ĈSSR.

Deklaro

Inter la 15a kaj 20a de aprilo 1985 en Pisanica — Internacia Esperanto-Kursejo, okazis la XVIIIa Konsultigo de reprezentantoj de Esperanto-organizaĵoj el socialismaj landoj. Ĝin partoprenis delegitaroj de Esperanto-organizaĵoj el Bulgario, ĈSSR (Ĉeĥa kaj Slovaka Asocioj), GDR, Hungario, Kubo, Pollando, Rumanio (observanto), Soveta Unio kaj Vjetnamio. La partoprenintoj substrekis la respondecon de siaj asocioj en la tutmonda agado kaj batalo por la konservo de la paco kaj por malarmado. Ili omaĝis al la 40a datreveno de la venko super la faŝismo, kaj salutas la unuflankan paŝon de Soveta Unio pri haltigo de la lokigado de raketoj, atendante adekvatajn reagojn de Usono.

La delegitaroj interŝanĝis spertojn pri la agado de siaj asocioj por la komuna progreso de la Esperanto-movado en nacia kaj internaciaj niveloj.

La partoprenintaj asocioj
— difinis taskojn por kunlaboro inter si;
— emfazis la gravecon de kunlaboro kun neesperantistaj sociutilaj organizaĵoj por reciproke kontribui al atingo de komunaj celoj kaj por antaŭenigi sciencan rekonon de la valoroj de Esperanto kiel komunikilo;
— substrekis la gravecon de faka aplikado de Esperanto;
— interkonsentis pri aktivecoj prepare al la 100-jara jubileo surbaze de la jubilea laborplano de UEA.

La delegitaroj dankas al Bulgara Esperantista Asocio pro la ekskluzive bonaj laborkondiĉoj.

La gišnunaj konsultiĝoj

1. 1969: Budapest, Hungario
2. 1970: Budapest, Hungario
3. 1971: Berlin, GDR
4. 1972: Smoljan, Bulgario
5. 1973: Budapest, Hungario
6. 1974: Karlovo, Bulgario
7. 1975: Mělník, ČSSR
8. 1976: Krakow, Pollando
9. 1976: Moskvo, USSR
10. 1977: Karl-Marx-Stadt, GDR
11. 1978: Poprad, ČSSR
12. 1979: Višegrad, Hungario
13. 1980: Sofio, Bulgario
14. 1981: Přerov, ČSSR
15. 1982: Jerevano, USSR
16. 1983: Radziejovice, Pollando
17. 1984: Bad Saarow, GDR
18. 1985: Pisanica, Bulgario

Empfehlungen zur Durchführung von Esperantoprüfungen

(Rekomendoj por Esperanto-ekzamenoj en GDR)

Auf Vorschlag der Kommission Methodik des Esperantounterrichts empfiehlt der Zentralvorstand des Esperantoverbandes im Kulturbund der DDR, Prüfungen zur Sprachbeherrschung auf der Grundlage der „Anordnung über die Durchführung von Lehrgängen zum Erwerb der Qualifikation als Sprachkundiger" vom 25. November 1980 (Gesetzblatt der DDR, Teil I, Nr. 36, vom 31. Dezember 1980, S. 380 ff.) und analog zu den „Lehrprogrammen für das Lehrgebiet Sprachkundigenausbildung der Stufen G, I, IIb, IIa, III" (Berlin, 1981) auch im Fach Esperanto einzuführen.

Diese Prüfungen sollten nach Möglichkeit über die Volkshochschulen realisiert werden, so daß dem Absolventen ein Sprachkundigennachweis auf dem entsprechenden Vordruck ausgehändigt werden kann. Auf Kreis- und Bezirksebene sind zunächst nur die Prüfungen zum Erwerb des Sprachkundigennachweises der Stufen G und I durchzuführen; Anträge auf Ablegung von Prüfungen in den anderen Stufen sind an den Zentralvorstand des Esperantoverbandes weiterzuleiten.

Kurzübersicht zu den Anforderungen:

Stufe G (Grundstufe):

— Gespräch zur behandelten Thematik
(Familie, Beruf, Wohnung, Arbeitstag, öffentliche Verkehrsmittel, Einkauf, Hotel, Restaurant, Post, Poliklinik; Themen aus dem Tätigkeitsbereich des Absolventen)
— Verstehendes Lesen
(unbekannter fremdsprachiger Text von ca. 800 Druckzeichen unter Verwendung eines Wörterbuches)

Zur Bewältigung der Anforderungen in der Prüfung G sind ca. 1 000 lexikalische Einheiten vom Absolventen zu beherrschen.

Stufe I:

— Verstehendes Hören
(unbekannter fremdsprachiger Text von ca. 1 500 Druckzeichen)
— Gespräch zur behandelten Thematik
(zusätzlich zu Stufe G: Bildungsweg, Heimatort, Dienstreise, Delegationsbetreuung, Dienstleistungen für persönlichen Bedarf, Bank, Ausstellungen, Sehenswürdigkeiten, Literatur, Theater, Kino, Konzert, Sport, Urlaub und Touristik; außenpolitische und außenwirtschaftliche Beziehungen der DDR, Sicherung des Friedens, sozialistische ökonomische Integration, entwickelte sozialistische Gesellschaft)
— Vestehendes Lesen
(unbekannter fremdsprachiger Text von ca. 1 000 Druckzeichen)
— Verfassen eines Briefes, einer Mitteilung oder eines Berichtes in der Fremdsprache nach deutsch vorgegebenen Sachverhalten
(unter Benutzung eines Wörterbuches Esperanto-Deutsch; Umfang des Schriftstückes ca. 900 Druckzeichen innerhalb von 45 Minuten)
— Übersetzen aus der Fremdsprache
(unbekannter Originaltext von ca. 1 200 Druckzeichen; Zeitlimit: 60 Minuten)

Die Beherrschung von ca. 3 000 lexikalischen Einheiten ist vorauszusetzen.

Die Bezirksvorstände des Esperantoverbandes werden gebeten, pädagogisch erfahrene und kompetente Mitglieder zu benennen, die innerhalb des Bezirkes bzw. innerhalb der einzelnen Kreise für die Realisierung dieser Prüfungsempfehlungen Sorge tra-

Fortsetzung auf Seite 79

40 jaroj post la liberigo

D-ro Hans-Joachim Hußner (†)

Nur kvardek jaroj

Nur kvardek jaroj pasis inter ambaŭ datoj — 8. 5. 1945 kaj 8. 5. 1985. Nur kvardek jaroj; tamen ili estas datoj el plej diversaj mondoj. Mi travivis la 8an de majo 1945 kiel militkaptito en franca lazareto. Mi malsaniĝis je difterio. Medikamentoj ne estis haveblaj, kaj post la difterio montriĝis difteria paralizo. Ankaŭ kontraŭ tiu malsano komence mankis la medikamentoj, kaj mi kuŝis sen helpo en la lito en ĉambro kune kun kvar tuberkulozaj kamaradoj. Tiuj kamaradoj mortis unu post la alia, kaj je la tago de la liberigo mi kuŝis sola en la ĉambro, sed ĉe mi sidis franca soldato. Li estis membro de la garda deĵoro kaj ofte vizitis min. Tiu soldato vivis sola, sen familio, profesia cirkradisto, li perdis ankaŭ la cirkan familion pro sia armeaniĝo. Li estis komunisto, do sen antaŭjuĝo. La multaj interparoladoj kun tiu komunisto estis tre gravaj por mi, por trovi la vojon en la socialismon. El kristana respondeco miaj gepatroj malakceptis la faŝismon, sed ili ne sciis, kia vojo kondukos el tiu mondo de faŝismo kaj milito.

Tiu franca soldato portis min dum la vespero de 8. 5. 1945 de mia lito al la fenestro. Ni ambaŭ sidis sur la fenestrobreto kaj rigardis la artfajraĵon, per kiu la civitanoj de Besancon festis la tagon de la liberigo. Granda ĝojo plenigis nin, sed mi faris bilancon, kiam la soldato foriris. Kvar semestroj da koresponda studado de la tekniko estas rompitaj, ĉar la komandanto tion ordonis. Kion mi povas fari por certigi mian personan estontecon? Kiam mi venis hejmen, mi tuj informiĝis pri la celoj de la Socialisma Unuiĝinta Partio de Germanio kaj fariĝis ĝia membro. Kamaradoj konvinkis min, iri al faklernejo pri historio kaj rezigni la studadon de tekniko. Mi poste laboris kiel instruisto, studis en Berlin historion kaj germanistikon, finstudis en Potsdam pedagogion kaj psikologion, ricevis la diplomon, doktoriĝis. Kelkajn funkciojn mi praktikis en la popola klerigo. Post 24 jaroj mi venis al la Teknika Altlernejo Ilmenau, por esplori pri diversaj problemoj. Mi estas en alia mondo, jam kvardek jarojn. La socialismo donis al mi ĉiujn eblecojn, plivastigi miajn scion, konojn kaj lertecojn.

Jam kvardek jaroj pasis inter ambaŭ datoj. Tiuj estas jaroj en paco, jaroj, plenigitaj de sukcesoj, jaroj en la nova mondo. Tiu estas la mondo de la socialismo. Sed anoj de la malnova mondo minacas nian novan mondon per vetarmado kaj kalumnio. Estu ni gardemaj per cerbo kaj mano! Neniam returne en tiun malnovan mondon!

Ludwig Schödl

Unika tradicio

estas la ĉiujaraj renkontiĝoj de membroj de nia iama Laborista Esperanto Asocio. Ĉu ekzistas io simila en alia lando aŭ en nia lando de alia iama laborista organizo?

Do, en novembro ni ree estis kune: ĉ. 40 gekamaradoj — ne plu tute junaj, almenaŭ laŭ ekstera aspekto, sed la koroj ankoraŭ entuziasmaj kiel antaŭ pli ol 50 jaroj. Bedaŭrinde tamen estis kaŭzo funebri pri pluraj forpasintaj k-doj, mi ĉi tie nur menciu nian fervoran kunbatalinton Walter Röhner. Ni kunvenis en Tambach-Dietharz, en la sudo de nia respubliko, kio kulpas pri la nealveno de kelkaj k-doj el la nordo.*)

Jam en Tambach mi povis raporti pri feliĉiga evento. Ĉu vi memoras la leteron de Boriso Ŝipolin, represita sur p. 95 en „d. e."? Tie Boriso rememoras la tempon antaŭ la faŝismo kaj la bonajn rilatojn kun germanaj k-doj. Je la fino tekstas: „Jam post faŝista renverso mi ricevis malgrandan presaĵon, en kiu sub aspekto de reklamo por radioriceviloj estis priskribitaj agoj de faŝistoj. Tiu estis lasta sciigo el Germanio.

Post tiuj jaroj trapasis longa tempo, sed ili ne devas esti forgesitaj. Lecionoj de estinteco devas helpi al nuna germana kaj same al sovetia junularoj, trovi siajn rektajn kaj ĝustajn vojojn en nuntempo. (Kiel vere!)

Leginte tion mi tuj skribis al Boriso k priskribis la menciitan „reklamon por radioriceviloj", kiun mi en junio 1933 fabrikis k dissendis — Adolf Schwarz verkis la tekstojn. — La respondo de Boriso venis tuj. Post pli ol 51 jaroj renoviĝis niaj kontaktoj!

Ankoraŭ alia kulmino de la jaro 1984: Inter la libroj, kiujn mi mendis ĉe Hungara Kulturcentro de Berlin, troviĝis „Naŭ jaroj en la infero" far Naĉo Kemalov. Temas pri la restado de la bulgara k-do N. K. en la fifama koncentrejo Sachsenhausen. Tiu libreto devus esti deviga por ĉiu! En tre sensintensa maniero Naĉo memkompreneble ankaŭ skribis pri siaj kamaradoj, plej ofte pri Franz Cyranek (Franc Ciranek). Tiun Franz C., mortinta antaŭ kelkaj jaroj, mi tre bone konis, ni efektive en nia politika agado vidis nin ĉiun semajnon ekde mia loĝado en Neuruppin. Nu, en la riporto de Naĉo, ankaŭ ludis rolon foto de Naĉo Franz k kelkaj aliaj arestitoj, kiu sub strangaj kondiĉoj estiĝis en la koncentrejo, k Naĉo demandas: „Kie nun troviĝas tiu foto?"

Mi tuj telegrafis al Bulgara Esperanto Asocio, petante la adreson de Naĉo k telefone informis Vera Cyranek, la vidvinon de Franz. Ŝi tuj venis k hura! — ŝi havis la serĉatan foton! Telegrafe venis la adreso de Naĉo — koran dankon, bulgaraj k-doj! Unu horon pli poste mia letero kun la foto flugis al Naĉo.

Cetere: lernejo, uzino, strato, sportgrupo . . . en nia distrikto nomiĝas laŭ nia k-do „Franz Cyranek". Franz ankaŭ estis amiko de Esperanto.

Liaj edzino k filino Ilona aktive dece agadas en la senco de Franz por socialismo k por certigi la pacon en la mondo. [k = kaj]

* Vidu „der esperantist" 129 (1/85), p. 20.

Detruita kaj rekonstruita Dresdeno

La Esperanto-Grupo en Dresden la 21an de februaro 1985 kunvenis por rememori la detruon de Dresden antaŭ 40 jaroj. La grupanoj prezentis solenan lumbildparoladon pri la iama baroka, poste detruita kaj rekonstruita urbo Dresden. La partoprenintoj akceptis jenan rezolucion:

Ni, la partoprenantoj de la kunveno, rememore al la sensenca detruo de nia urbo antaŭ 40 jaroj, apelacias al la tuta mondo: kunhelpu ĉiuj malebligi militon, por ke neniam okazu simila sorto por iu urbo aŭ popolo, kiel ĝi trafis Dresdenon.

Ni admiris hodiaŭ per lumbildoj la belecon de iama baroka centro de Dresden: Zwinger, kastelo, preĝejoj. La unuaj bildoj post la nokto de la 13a de februaro 1945 prezentis al ni ruinojn kaj mortigitajn homojn. La iama simbolo de la urbo, la ronda kupolo de la Virgulina Preĝejo disfalis. Ĉie restis nur ruinoj. Sed la urbo vivis. La homoj formetis la ruinojn laŭ eblecoj tuj post la bombado. Post la milito oni komencis restaŭri la detruitajn historiajn konstruaĵojn. Dank' al la helpo de la sovetia armeo la pordoj de pentraĵgalerio malfermiĝis kaj ĉiuj povis jam dum la 50aj jaroj admiri la unikajn artaĵojn kiel iam.

La restaŭrado kaj novkonstruado daŭris kaj daŭros. Laŭ eblecoj oni restaŭras la vidindaĵojn. Ni ĉiuj partoprenis en la pacmanifestacio je la 13a de februaro 1985. Vespere sekvis la solena inaŭguro de rekonstruita operejo — rekonstruita tute originale. Ĉiu fieras pri la akiraĵoj sub gvidado de laborista klaso kaj ties partio.

Ankaŭ ni — la esperantistoj daŭrigas la tradiciojn de la laborista Esperantomovado.

Adreŝango en Gorkij

Gorkija Esperanto-klubo „Por la Paco" informas, ke ĝia poŝtadreso ŝanĝiĝis. La nova adreso estas: Gorkija Esperanto-klubo „Por la Paco", abonkesto 147, SU—603006, Gorkij N-6, Soveta Unio. La eksa adreso de la klubo ne plu validas.

Fortsetzung von Seite 77

gen; mit diesen Bundesfreunden werden über den Zentralvorstand spezielle Beratungen organisiert.

Dr. paed. Dahlenburg
Vorsitzender der Komission Methodik beim Zentralvorstand des Esperantoverbandes der DDR

Nove sur la planlingva merkato:

Adli kaj Romanid

Jen du novaj planlingvaj projektoj, oni legas en la lastatempa gazetaro. Ĉu vere tute novaj? Ni vidos.

Pri Adli oni legis meze de 1984 en kelkaj taggazetoj de GDR. Ĝin „helpe de komputiloj" kreis la franca inĝeniero pri elektroniko Antoine Piras laŭ la publikigitaj informoj. Piras jam formis 25 000 vortojn. 42 % venas el la itala, 22 % el la franca, 18 % el la hispana kaj pluaj el la itala, germana kaj lingvoj nehindo-ĝermanaj. Laŭ tiu kalkulo, laŭ la projekto-aŭtoro, jam ĉirkaŭ 33 % de la monda loĝantaro devus kompreni la leksikon de Adli. Sinonimoj devas manki, same polisemio (multsignifeco). Pro tio, ekzemple, la franca ‚temps' signifas ‚vetero', la angla ‚time' — tempo kaj hispana ‚tiempo' indikas la ‚tempo' de la muziko.

Jen specimeno en Adli:

„My ami caro Julio, i me hasten de repondre a ta letra que li coreceive ce matin e dont i tenner a te danken". (Mia amiko kara Julio, mi urĝigas min por respondi al via letero, kiun mi ricevis ĉi-matene kaj mi devas al vi danki.)

Aŭ: „I be lucky que tu te interest a cette langue international". (Mi estas feliĉa, ke vi interesiĝas pri tiu internacia lingvo) Pri „nova artefarita lingvo" informas „Berliner Zeitung" la 23an de marto 1985. Tiu „nova" lingvo estas kreita en Hungario surbaze de la romanaj lingvoj kaj la angla. Temas pri Romanid. Ankaŭ tie la leksiko jam havas 20 000 vortojn, ni legas. Ili devenas el franca, hispana, portugala, itala kaj angla, se ili similas laŭ ortografio kaj signifo. Por formi novajn vortojn oni utiligas radikojn kaj afiksojn. La gramatiko de Romanid sekvas la romanajn lingvojn. Fakte la informo, venanta el Budapest, parte estas malĝusta. Ne temas pri „nova" artefarita lingvo (ni preferas la terminon ‚planlingvo'), sed ja pri la projekto de Zóltan Magyar el la jaro 1958, kiu do atendas jam 27 jarojn je la sukceso. Jen specimo:

„Antifashist literatura responded validmente a vital questiones de nostre populo et kontribuid a reaquisto de un pur demokratik nacional konscience" (la antifaŝista literaturo respondis valide al vivaj postuloj de nia popolo kaj kontribuis al la akiro de pure demokrata nacia konscio).

Kion komenti?

1. Estas tute normale, ke ĉiujare aperas 3 — 5 novaj planlingvaj projektoj sur la „planlingva merkato". Aŭ la aŭtoroj ne konas la diversajn provojn jam faritajn aŭ ili konscie ignoras ilin. La projektoj fakte entenas nenion novan, nenion originalan, kio ne jam estas provita en unu el la 1 000 projektoj.
2. La recepto estas ĉiam la sama: aŭ oni prenas latinajn-grekajn radikojn (ekz. ĉe „Gloso", de Wendy Ashby kaj Ron Clark 1982, London) aŭ iom reformas Esperanton miksante ĝin kun alilingvaj elementoj (kiel ĉe „Vikto" de la hungaro Vilmos Bösz, Sopiano 1981) aŭ, kiel ĉe „Romanid" imitas lingvogrupon.
3. Kompreneble ĉiuj aŭtoroj de novaj projektoj substrekas, ke ilia bebo estas pli „perfekta", pli „bone farita" aŭ pli „moderna" ol Esperanto. Sed neniu ellaboris ĝis nun la kriteriojn por objektive mezuri modernecon, perfektecon aŭ facilecon de lingvo. Nur el la praktika apliko oni povas tiri iujn konkludojn. Sed konsiderindan praktikon fakte nur havas Esperanton.

La lingvoprojektantoj ĝenerale ne komprenas la socian karakteron de lingvo. Ne estas granda malfacileco baki novan projekton. Tion povas fari ĉiu filologe iom lerta homo. La malfacileco konsistas en tio, apliki la lingvon en la praktiko, krei al ĝi uzantaron.

Kaj por atingi tion, ne estas tiom gravaj lingvaj detaloj, kvankam la strukturaj ecoj ja devas faciligi la alproprigon kaj aplikon. Pri la

Pli da rekomendoj por faka verkado

El kontribuo de Bernard Golden

En sia artikolo „Rekomendaro por faka verkado" **(der esperantist,** n-ro 129 (1/1985), pĝ. 4—10), Linde Knöschke donas konsilojn por la preparado de fakaj aŭ sciencaj manuskriptoj, ĉu por publikigo, ĉu por prelegado. Multo en tiu pensinstiga verko estas nekontesteble valora, kaj la gvidlinioj estas aplikendaj fare de fakuloj en ĉiuj sciencobranĉoj, senkonsidere, ĉu ili verkas gepatralingve aŭ en Esperanto. Substrekenda estas la rimarko de la aŭtorino, ke estas necese verki aparte por diversaj publikoj, por ke oni plej efike komuniku faktojn kaj ideojn. Plue, ŝi prave avertas, ke neniu enpaŝu en fakan terenon — almenaŭ se li poste intencas publikigi la rezultojn de siaj esploroj — sen akiri profundan kaj ĝisdatan scion pri la sciencobranĉo, kaj sen primajstri la komunuzan lingvon same kiel la faklingvon. Bedaŭrinde, tio ne ĉiam okazas, kaj miaj dosieroj estas plenaj de citaĵoj el tekstoj, kiuj estas fakte fuŝaj kaj lingve lamaj.

Ŝajnas, ke dum la tuta historio de Esperanto troviĝas fervoraj entuziasmuloj, kiuj, pro la ĝenerala diletantismo trapenetranta la movadon — oni pensu pri propagandado kaj organizado — sukcesas akceptigi samnivelan laboron en la sferoj de la lingvistiko kaj la sciencoj. Kvankam lastatempe videblas rimarkinda ŝanĝiĝo de sinteno ĉi-rilate, kiel atestas la aranĝado de diverslandaj sciencaj konferencoj kaj seminarioj kaj la eldonado de profesi-nivelaj fakpublikigaĵoj, ankoraŭ restas kelkaj stagnaj flankakvoj.

---

lingviĝo de la projekto aparte decidas nelingvaj, sociaj faktoroj. Tion, inter alie, instruas Esperanto.

4. Sendube ankaŭ estonte daŭre aperos novaj **projektoj.** Ili trankvile aperu. Sed **lingvo** funkcianta estas Esperanto.

Detlev Blanke

Kiam mi kritikas lingvan kaj fakan malprecizecon kaj malĝustecon en nefakaj periodaĵoj kiel **Heroldo de Esperanto** kaj **Monato,** la redakcio preferas silentigi miajn fakscie pravigitajn komentojn, pretekste, ke ne eblas strebado al tro altaj sciencaj normoj en artikoloj verkitaj de, kaj destinataj al, laikoj. Mia vidpunkto estas pli severa; oni ne permesu nesciencan pritrakton de iu ajn temo, do la redakcio havas la respondecon kontroligi la enhavon de tiaj verkoj same kiel la lingvouzon.

Ĉe la fino de sia artikolo en § 12, Linde Knöschke prave rekomendas, ke oni petu, ke kolego reviziu la manuskripton, kiun oni verkis. Tia revizio de faka enhavo estas kutima procedo de la scienca mondo, sed tute alian problemon prezentas lingva revizio. Kiu okupiĝu pri tiu tasko? Fake kompetenta esperantisto **ne ĉiam** estas same kapabla pri lingvaj aferoj. Du konsideroj devas influi la elekton de lingvorevizianto. Unue, li devas posedi bonan scion pri la gramatiko, semantiko kaj stilo de Esperanto. Due, li devas esti denaska parolanto de lingvo, kiu ne nur **ne estas la sama kiel tiu de la verkinto de la manuskripto,** sed prefere estas lingvo apartenanta al alia lingvobranĉo aŭ familio. Laŭ mia scio, tio malofte okazas, kaj se la verko estas reviziita, estas samlingvano de la aŭtoro, kiu faras tiun laboron. Kompreneble, estas utile, se la revizianto scias ankaŭ la lingvon de la aŭtoro por eventuale povi kontroli dubajn punktojn. Linde Knöschke ne sufiĉe emfaze traktis tiun ĉi aspekton de la reviziado, ĉar ŝi skribis jene: „Nepre petu kolegon, prefere eksterlandan, revizii vian manuskripton. Kvar okuloj vidas pli ol du!" Refoje mi malsamopinias. Kvar okuloj ne sufiĉas. Oni aldonu ankoraŭ du!

Rim. de la redakcio:

Sekvas kelkaj atentigoj pri lingvaj malglataĵoj en la artikolo de Linde Knöschke, kiujn ni pludonis al ŝi.

Kompletigo al la artikolo pri G. Demidjuk

En „der esperantist" 123 (1/1984) aperis artikolo pri la fama sovetia esperantisto kaj veterano Grigorij Demidjuk. K-do Demidjuk intertempe donis al ni kelkajn kompletigajn indikojn pri la bibliografio de siaj verkoj:

Precizigo de n-ro 3:

Lenin: Pri religio. Du artikoloj: 1. Socialismo kaj religio (trad. M. Lapin kaj G. Demidjuk), 2. Pri rilato de laborista partio al religio (trad. G. Demidjukt), Moskvo 1929

Aldonu al la bibliografio:

— Al la SAT-anaro de la tuta mondo. Deklaro de la klasbatala SAT-opozicio. En: Internaciisto, n-ro 1 (oktobro 1930), p. 1 — 2. Subskribita de J. Batta, Bäßler, G. Demidjuk, E. Drezen, N. Incertov, B. Keable, V. Kolĉinski, H. Muravkin, R. Bulgariano, D. Snejko, W. Vildebrand, F. Wolff.
— Kial Lanti atakas personojn? En: Internaciisto 2 (novembro 1930), p. 13

K-do Demidjuk skribis plue:

„Sur la paĝo 14 de Internaciisto 2 (novembro 1930) estas noto „Kiel aspektas en realo la fabelo pri SEU-malhelpanto al SAT". Tiu noto estas grava por evidentigi la mensogon de Lanti, ripetitan en „Historio de SAT", pri tio, ke SEU ne pagis sian ŝuldon al SAT. Krome el la noto oni povas konstati, ke la unuaj numeroj de „Internaciisto" estis presataj en Moskvo. Tiun fakton mi bone memoras kaj povas atesti.
Kaj fine la cititaj gazetoj venigas min al la konstato, por verki ĝustan historion de Esperanto-movado en Sovetio necesas detale studi la tiamajn publikaĵojn. El la „Bibliografija esperantskoj peĉati USSR" (Bibliografio de Esperanto-presaĵoj en USSR) aperinta en Meždunarodnij jazyk 1930, n-ro 1 (p. 59 — 63) mi konstatas publikigon en Sovetio de: „La vojo de klerigo" 1926, n-roj 1 — 11, 1927 n-roj 1 — 12, 1928 n-roj 1 — 12, 1929, n-roj 1 — 4. Soveta Pedagogia revuo 1929, kajeroj 1 — 7a.

Rimarko de la redakcio

Ĉu ne estas urĝa tempo por ampleksa kaj detala priskribo de la historio de SEU? Ni volonte ĉi-rilate kunlaboros pri la germanaj-sovetiaj rilatoj.

Komputi kaj ‚Kibernetiko'

En n-ro 124 de „der esperantist" s-ino Dehler publikigas leteren de Gaston Waringhien. La ĉefredaktinto de PIV fine akceptas la verban radikon **komput/i** kun la signifo, kiun ĝi havas en la lingvoj Angla, Hispana kaj Portugala, kaj proponas ŝanĝi la difinon en PIV. La gušta difino estas: **Produkti datumon aŭ datumojn el alia datumo aŭ aliaj datumoj per algoritma procedo.** Estas ĝojige, ke post la deklaro de s-ro Waringhien neniu plu povas kontraŭargumenti per la erara difino en PIV.

Bedaŭrinde, s-ro Waringhien ankoraŭ ne akceptis la vorton **kibernetiko,** preferante la francisman formon „cibernetiko". Li bazas sian argumenton sur la fakto, ke la pli-multo de tiuj grekaj vortoj, kiuj trans-iris en la Latinan, ricevas latinan literon **c** anstataŭ la greka litero **kappa**. Sed li eraras kredante, ke tio validas por ĉiuj grekaj vortoj. Ĝi **ne** validas i. a. por la greka **kybernetes,** kiu fariĝis latina **gubernator**. En ĉi tiu kazo **kappa** fariĝis ne **c**, sed **g**. La greka verbo **kybernao** (= direkti) fariĝis latina guberno. Do, en la Latina ekzistas nek „cybernetes", nek „cyberno", kaj ne ekzistas filologia motivo por uzi similan formon en Esperanto. La formo plej ĝusta filologie kaj plej konvena praktike estas kaj restas: **kibernetiko**.

Antal Münnich

Wera Dehler

Terminologiaj principoj de Esperanto

Antaŭrimarko

La sekva dokumento estas dua propono por gvidmaterialo, helpu al diversfakaj specialistoj sen esperantologia, filologia kaj precipe terminologia klero, kunlabori en internaciaj fakaj komisionoj pri sistemigo, evoluigado kaj normigo de sia faka leksiko kaj prepari la koncernajn terminarojn.

Antaŭvideble altnivelaj ekspertoj pri iu fako aŭ scienco ne havos sufiĉe da tempo por enprofundiĝi en novan interdisciplinan kaj dinamike progresantan sciencon — kies esenco tamen necesas por produkti terminarojn, kiuj respondas al aktuala nivelo.

Ĉi-materialo do celas kompili la plej esencajn principojn, kiuj rezultas el la ĝisnunaj spertoj de Eo-movada terminologia laboro unuflanke kaj internacia terminologio-unuecigo aliflanke, kaj prezenti ilin en formo laŭeble facile komprenebla por ne-terminologo. Gvida principo ĉi-rilate estis „sufiĉo kaj neceso".

La unuan proponon („konsideroj pri . . .") ricevis proksimume 30 personoj kun la peto pri reviziado, inter ili estraranoj de UEA, akademianoj, lingvistoj, esperantologoj, leksikografoj kaj specialistoj pri diversaj fakoj. Preskaŭ ĉiuj afable reagis kaj principe konfirmis la prenitan vojon.

Por la plua laboro la kuraĝigoj de Renato Corsetti kaj Humphrey Tonkin same valoras kiel la asertoj de G. Bojaĝieva (biologo, BG), Giso Brosche (veterinaro, GDR) kaj Richard Partecke (ekonomo, GDR), ke unuflanke tiaj principoj necesas por ilia terminara laboro kaj aliflanke tiu-ĉi propono ne estas tro „scienceca" (Partecke eĉ opinias kelkajn erojn tro detale prezentitajn). Tiun-ĉi duan version influis abundo da valoraj, pli-malpli gravaj, atentigoj, rimarkoj kaj kritikoj, pro kiuj ni speciale dankas al kolegoj Detlev Blanke, Rüdiger Eichholz, Geza Felsö, Gerhard Kalckhoff, Josef Kavka, Lajos Kovacs, Erich-Dieter Krause, Georg Friedrich Meier, Vladimir Nemec, Hans-Joachim Plehn, Istvan Szerdahelyi kaj Jan Werner.

Ĉar la plimulto da ŝanĝo-proponoj venis nur de po unu persono, nature ne ĉiuj povis realiĝi. Plurajn reefiojn nur trovis du eroj:

1) la neologismo **„karaktro"** ne gajnis sufiĉe da simpatio kaj el inter la alternativaj proponoj ni elektis **„signifero"**;

2) pri **„terminografio"** ekestis diskuto, kiu prefere koncernis la difinon de tiu subnocio de „terminologio". La utilon, eĉ neceson, de distingo inter teorio kaj praktiko en terminologia agado preskaŭ neniu pridubis kaj la neologismo „terminografio" plaĉis al multaj, sed Plehn proponas, ke ĝi estu nur:

„la arto, prezenti la rezultajojn de la terminologio en alirebla formo". (Prilaborado/sistemigo de faka leksiko, kreado de necesaj terminoj, kompilado de terminaroj do estus tasko de **„speciala terminologio"**, dum **„ĝenerala terminologio"** devus okupiĝi pri superorditaj, ĝeneralaj trajtoj kaj principoj, komune validaj por ĉiuj fakoj.)

Laŭ propono de Eichholz oni eĉ distingu 4 „branĉojn de terminologio:

1) ĝenerala terminologio (scienco)
2) speciala terminologio (aplikata scienco)
3) terminografio (tekniko) provizas la plej taŭgajn materiajn metodojn por konatigi kaj uzebligi la rezultojn de la laboro de 1), 2) kaj 4)
4) termino-kreadiko (arto de la kreado de novaj vortelementoj)"

Laŭ J. Werner „terminografio" kaj „terminografo" superfluas, ĉar laŭ lia koncepto „devas esti pleje rutinaj terminologoj la homoj, kiuj prilaboros la terminarojn" — sed konsidere la ĝeneralan tempomankon unuflanke kaj la dinamikan ampleksiĝon de la nova sciencobranĉo aliflanke tia pretendo certe barus la vojon al multaj kunlaboremaj fakuloj kompetentaj pri la propraj fakoj.

La difinoj en la glosaro (p. 84) do proponas kompromison, kiu povos servi kiel diskut-bazo. Valoras pripensado kaj esprimado de ĉies opinio — ja temas pri sufiĉe fundamentaj por nia estonta laboro nocioj kaj terminoj. Kompreneble ne nur pri ili, sed pri la tuta dokumento viaj reefioj bonvenos!

Sed apud la diskuto la agado mem ne plu estu prokrastita. Jam ekzistas kelkaj provizoraj gvidiloj, kiuj kompletigas unu la alian kaj povas helpi al pli unuecaj labor- metodoj kaj -rezultoj.

Cetere: la internaciaj terminologiaj normoj ISO R 639 (1967), ISO/R 704 (1968), ISO/R 860 (1968), ISO/R 1087 (1969) nuntempe estas en profunda reviziado; ISO/R 919 kaj ISO 1149 estos nuligataj kaj transformiĝos al nova norm-projekto pri la perlaborado de terminaraj normoj.
Ni ĝisatendu la labor-rezultojn de ISO TC 37 kaj utiligu ilin kiel bazo por „fina propono" de tiu-ĉi dokumento; intertempe ni diskutu kaj plibonigu ĝin — kaj prefere eklaboru laŭ ĝi!

I. GLOSARO

Por la kompreno de la sekva teksto ni donas la provizoran difinon de jenaj plej gravaj terminoj.
Ĝi estas revizienda post apero de Esperanto-Terminologia Terminaro, kiu estas preparata.
1. **objekto:** iu ajn fenomeno de la ekstera aŭ interna mondo, observebla far homo; ĝi povas esti ajo, eco aŭ ago.
2. **nocio:** reprezentajo de objekto (1) en pensado.
3. **signifero:** iu ajn el la ecoj (de la objekto [1]), kies sumo formas la enhavon de nocio (2) (= signifo [4])
4. **signifo:** la tutajo de ĉiuj signiferoj (3), kiuj formas nocio-enhavon.
5. **nocio-sistemo:** pluraj nocioj (2) interligitaj per logikaj aŭ aliaj rilatoj.
6. **klasifiko:** nocio-sistemo (5) kies strukturo estas fiksita.
7. **difino:** vorta priskribo de nocio (2).
8. **termino:** nomo (vorto, vortogrupo aŭ alia konvencia simbolo) alordigita al difinita nocio (2), valida por limigita faka tereno.
9. **faka leksiko:** ĉiuj terminoj (8) de iu fako en iu lingvo (= faka vortprovizo)
10. **nomenklaturo:** sisteme ordigita kolekto de nomoj en speciala fako (botaniko, geologio, kemio, zoologio k.a.)
11. **terminaro:** (parto de) faka leksiko (9) kaj/aŭ nomenklaturo (10) prezentita en formo de kajero, sliparo, mikrofiĉo aŭ alia datum-portilo.
11a. **norm-terminaro:** sisteme aranĝita terminaro (11) ellaborita far kompetenta faka komisiono laŭ terminologiaj (13) principoj, eldonita far aŭtoritata institucio, regule reviziata/ĝisdatigata.
12. **terminografio:** verkado de norm-terminaroj (11a) (inkluzive kreadon de terminoj kaj elekton de konvenaj datumportiloj.
12a. **terminografo:** kompetentulo pri speciala fako, verkanta norm-terminaron (11a) pri sia fako.
13. **terminologio:** scienco pri faka leksiko (9) kaj nomenklaturoj (10), esploro kaj instruo de ĝiaj laŭplanaj evoluigo kaj normigo.
13a. **artikolo:** alineo en (norm-)terminaro (11/11a), konsistanta el kapvorto (termino [8]), difino, evtl. ilustrajo, derivajoj, ekzemploj, alilingvaj ekvivalentoj ktp.

II. ENKONDUKAJ RIMARKOJ

1. Por ebligi ampleksan aplikadon de Eo en ĉiuj fakoj kaj sciencobranĉoj necesas evoluigo de la faka leksiko laŭ **racia planado**. „Natura evoluo" garantius nek la unuecon de la esperanta fakleksiko nek la bezonatan rapidecon de ĝia elformiĝo.

2. Evoluigo de faka leksiko estas **interdisciplina** tasko, kies ĝusta solvo dependas de kunordigita, harmonia kunlaboro inter specialistoj pri la koncerna fako kaj specialistoj pri terminologio (lingvistoj, klasifikistoj, leksikografoj k.a.).
Terminologoj ellaboru ĝeneralajn regulojn kaj rekomendojn, observu la procedon de terminografia laboro, konsilu en dubaj kazoj kaj zorgu pri unueco de la faklingvo. Sed pri terminaro de difinita fako respondecu tiuj specialistoj, kiuj kompetentas pri koncernaj nocioj kaj ilia difinado, kaj kiuj bezonas la terminarojn kiel laborilojn.

3. Terminografia laboro devas esti organizata
a) **internacie,** ĉar
— nacilingvaj terminoj ofte ne koincidas inter si
— ofte necesas kompromisoj por fiksi nocio-sistemojn kaj minimum-difinojn
— terminoj ellaboritaj en nur unu lingva regiono poste povus iĝi fonto de malhelpaj miskomprenoj kaj absurdigi Eo'n kiel interkomprenilon.
b) **interfake,** ĉar
— la limoj inter la fakoj kaj inter faka kaj ĝenerala leksikoj ne estas precizaj kaj apriora limigo apenaŭ eblas,
— koncerne al bazaj terminologiaj rekomendoj, postuloj kaj gvidlinioj kaj koncerne al praktikaj bezonoj de terminografia laboro ekzistas multaj trajtoj komunaj al ĉiuj fakoj, pri kiuj rekomendindas kunlaboro.

4. Serioza laboro sur terminologia kaj terminografia kampoj devas esti planata kaj realigata dum relative **longaj periodoj.** Trorapido delogus al suprajeco. Necesas diskuto profunda kaj vasta. Sed **tempo ne perdiĝu,** ĉar Eo estas subevoluinta rilate al la faka leksiko. Konsidere al la daŭre kreskanta evolu-rapideco en scienco kaj tekniko, tiu relativa malprogreso en la faka leksiko konstante pligrandiĝas.

5. Pro tio necesas **racia labororganizado,** kiu helpu eviti tempoperdon kaj malŝparon de fortoj, kiu unuflanke ebligu kreajn iniciatojn kaj fakspecifajn variantojn de kunlaboro, sed aliflanke garantiu la unuecon de la faklingvo.

6. Tiajn postulojn intencas realigi la **Terminologia Sekcio de la Scienc-Eldon Centro de UEA (TeS).** (Vidu la materialon „Organiza strukturo de TeS" en „Bud. Inf." 6/83)
Por laŭeble plej baldaŭ atingi aktualan nivelon en sia laboro TeS utiligos la **tradiciajn spertojn** de Eo-movadaj instancoj (ISAE, AdE) unuflanke kaj atentos la rekomendojn de progresanta **terminologio-unuecigo internacia** (ISO, Infoterm, Unesko) aliflanke.

7. La ĉefa celo de TeS estas evoluigo kaj normigo de la faka leksiko en Eo. Ĝi eldonos **serion da terminaroj** sisteme aranĝitajn kun difinoj kaj nacilingvaj ekvivalentoj kiei **norm-proponoj.** Dum kelkjara prov-periodo ĉiuj Eo-fakuloj havos la eblecon apliki, diskuti kaj kritiki la proponojn. Definitivaj eldonoj aperos kiel **normterminaroj.** Konforme al la teknika progreso TeS klopodos starigi elektronikan termino-bankon.

III. BAZAJ TERMINOLOGIAJ PRINCIPOJ

La sekvaj du principoj estas bazaj por ĉiu terminografia laboro. Ilin oni ĉiukaze respektu, dum aliaj principoj, rekomenditaj far diversaj aŭtoroj, parte kontraŭas unu la alian kaj devas esti zorge aplikataj laŭ la specifeco de la unuopaj terminoj.
Por substreki la diferencon inter bazaj kaj ceteraj principoj, la lastaj sekvos en tiu-ĉi dokumento kiel „postuloj al la termino" (IV 5.1) resp. „rimedoj kaj metodoj por nomado" (IV 5.2).

1. **Sistemeco/klasifiko**

Ĉiu terminografia laboro eliru de la nocioj. La nociojn oni difinu tiel ke ili formu koheran **sistemon.**

Terminoj de iu fako ne ekzistas izolite, sed rilatas al aliaj terminoj de la sama fako, de aliaj fakoj kaj de la ĝenerala lingvo. Ĉiuj terminoj de unu fako prezentas sistemon, sur kies strukturo baziĝas ĉiu faklingva normigado. Pro tio norm-terminaroj nepre estu **sisteme aranĝitaj,** t.e. laŭ klasifiko de nocioj.

2. **Nocio — difino — termino**

Antaŭ ol serĉi, elekti aŭ krei nomon por objekto necesas precize klarigi pri kio temas (nocio). Nocioj bezonas klarajn limojn por diferenciĝi disde aliaj nocioj kaj por ekkoni la rilatojn inter ili. Tion ebligas difino (vd. IV. „paŝo 4"). Nur post (sistemigo kaj) difinado eblas serĉi aŭ elekti (aŭ konfirmi!) taŭgan nomon por la objekto.

IV. PAŜOJ DE TERMINOGRAFIA LABORO

Por certigi la realigon de tiuj bazaj principoj, necesas laŭpaŝa agado. Kutime oni distingas 5 paŝojn, el kiuj la unuaj kvar rilatus al la regiono de nocioj kaj nur la kvina al la regiono de nomoj.

Paŝo 1: Limigo de la fako (plano)

Necesas precize fiksi la limojn de la prilaborota faka tereno laŭ ĉiuj eksteraj kaj internaj rilatoj. Laŭeble oni ataku difinitan fakon el du direktoj:

a) kompetentaj fakuloj komune prilaboru bazajn terminojn de la fako (ekz. „medicino")
b) samtempe la samaj specialistoj prilaboru siajn specialajn subfakojn (ekz. „kirurgio", „oftalmologio", „psikiatrio" ktp.) aŭ eĉ malpli vastajn kampojn — sed ĉiam konsidere (laŭeble kunlabore!) kun najbaraj kampoj kaj kun la tuto.

Decidu proksimume pri la amplekso de la terminaro — prefere ĝi enhavu ne pli ol 1 000 terminojn.

Elektu la aldonajn lingvojn, kiujn vi uzos krom Eo, la „lingvo de la difinoj". (Pri ĉiu el la „kromlingvoj" devos perfekte kompetenti minimume unu membro de via terminografia komisiono.)

Paŝo 2: Kolektado kaj analizo de fontmaterialoj

Inter la uzotaj fontoj distingeblas 3 tipoj:

a) klasifikajoj, t. e. sistemaj superrigardoj pri la koncerna fako,
b) manlibroj, lernolibroj, enciklopedioj, fakaj artikoloj; evtl. ankaŭ komercaj kaj entreprenaj katalogoj, prospektoj de foiroj kaj ekspozicioj; laŭeble ĉiuj fakaj tekstoj en Eo.
c) Terminaroj, difinvortaroj, glosaroj.

Unue serĉu internaciajn norm-terminarojn (ISO, IEC); ili estas listigitaj en bibliografioj de Unesco, Infoterm kaj ISO.

(La plej aktuala tia bibliografio aperis kiel „Infoterm Series 2 International bibliography of standardized vocabularies", München 1978, kaj estas daŭrigata/ĝisdatigata i. a. en la revuo „Lebende Sprachen" (vivantaj lingvoj), Berlin okc.).

Ĉiu dokumento uzota por la projektita terminaro estu registrata sur **bibliografia referenca slipo** (aŭ karto). La referenca slipo enhavu indikojn pri aŭtoro, titolo, trovloko kaj trovdato kaj la signon de la prilaboranto. Krome rekomendindas siglo (mallongigo de la dokumento, kiu same estu laŭeble notita sur la fonto mem (per krajono).

Por gajni superrigardon pri la unua stato de via faka tereno kaj la jam ekzistantaj (proponitaj) Eo-terminoj, trakribru la fontmaterialojn, selektu ĉiujn fak-rilatajn terminojn kaj notu ilin sur slipojn A 6, (ĉiam indikante la fonto-siglon).

Tia **treminografia (labor-)slipo** entenu (minimume):

por nacilingvaj fontoj: tradukon de la difino aŭ alian priskribon de la nocio; klasifikan numeron; la loko por Eo-termino (nomo) restu libera aŭ ricevu provizoran signon por marki la nocion dum la laboro (antaŭ definitiva nomado dum paŝo 5)

por Eo-fontoj: nomon de la termino + (provizora) difino (resp. priskribo, klarigo, kunteksto), la loko por etnolingvaj ekvivalentoj restu libera.

Notu: por eventuala ilustrajo kaj por ĉiu uzita etnolingvo necesas aparta slipo — precipe, se la difinoj ne koincidas. Tio signifas, ke por ĉiu nocio vi havos plurajn slipojn. Ordigu ilin laŭsisteme.

Analizo de terminaro (kaj aliaj materialoj) signifas registri kaj kompreni la interrilatojn kaj limigojn de ĝiaj nomoj kaj nocioj. Per tio vi konstatos, ke ekzistas

a) unu nomo por diversaj nocioj **(homonimoj)**
   (ekz.: „modelo" —
   1) objekto farita por esti imitata
   2) persono pozanta antaŭ artisto
   3) imitaĵo de objekto por studaj celoj)
b) diversaj nomoj por unu nocio **(sinonimoj)** (ekz., razeno/gazono)
c) manko de nomo por nocio **(breĉoj)**
   (ekz.: formo de psikoterapio kiu utiligas la kreajn kapablojn de la paciento por evidentigi intra- kaj interpersonajn rilatojn helpe de materialprilaboraj metodoj kiel pentrado, ŝmirado, modlado k. t. p.)

Paŝo 3: Sistemigo/klasifikado

Esploru ĉu ekzistas taŭga por via celo klasifikado (ekz. UDK) aŭ nocio-sistemo(j), sinoptikaj tabeloj aŭ aliaj grafikaj prezentaĵoj — tio ŝparus konsiderindan parton de via laboro!

Por strukturi (sistemigi) vian fakan terenon, eblas

1) transpreni senŝanĝe taŭgan sistemon (malofta kazo)
2) transpreni kaj transformi relative taŭga(j)n sistemo(j)n
3) formi nova(j)n sistemo(j)n (kiu[j] respektas la eksterajn kaj internajn limojn de la elektita fako laŭ via komenca decido).

Esploru ĉu la rilatoj inter viaj nocioj estas

a) hirarkiaj rilatoj (super-, subnocio: arbo — tilio, pino, pomarbo; pišta motoro — cilindro, pišto, bielo, kranko)

b) aliaj rilatoj, ekz.:
— sekvo-rilato
(antaŭulo — sekvanto) (patro — filo)
— kaŭzo rilato
(kŭzo — efiko) fulmo — tondro)
— produkta rilato
(materialo — produkto) (argilo — vazo)
— transmisia rilato
(sendanto — ricevanto) (parolanto — aŭskultanto)
— instrumenta rilato
(ilo — apliko de ilo) (broso — brosi)
— kontrasto
(antonimo, mal-vorto) (analizo-sintezo)
(pluaj informoj pri nocio-sistemoj kaj ilia prezentado: DIN 2331 aŭ Wüster 1979)
Pripensu ke nocio-sistemoj povas grave diferenci de unu lingvo-regiono al alia, eĉ de unu aŭtoro al alia: interkonsentu kun viaj alilandaj kunlaborantoj kaj elektu (aŭ kreu) la plej taŭgan sistemon.
Sed: sistemigo ne estas memcela: ĝi helpu al la uzonto de la terminaro ekkoni la interrilatojn kaj konekson de koncernaj terminoj. Pro tio: evitu supersistemigon!

Paŝo 4: Difinado

Celo de difinado estas preciza limfiksado de la enhavo aŭ amplekso de nocio. El pluraj signiferoj de la nocio oni elektu la necesajn kaj sufiĉajn, kiuj distingas ĝin disde aliaj nocioj.
(ekz. por **enhavo-difino:** „xy: arboj kaj arbedoj kun ledecaj, pingloformaj folioj"
por **amplekso-difino:** „xy: abio, piceo, pino, taksuso, lariko")
En difinoj oni uzu nur terminojn antaŭe difinitajn aŭ ĝenerale konatajn. Oni eliru de plej proksima super-nocio, kaj aldonu la diferencigajn signiferojn.
Interrilatoj inter difinoj (el unu nocio-sistemo) respondu al interrilatoj inter nocioj (difinoj spegulu la sistemon).
Difino strikte rilatu al la koncerna terminaro (ekz. difino de „kverko" diferenciĝos laŭ fakoj botaniko, heraldiko, lignoprilaborado . . .)
Fine de paŝo 4 kontrolu, ĉu ĉiuj difinoj akordiĝas kun aliaj difinoj- se ne, korektu ilin.

Paŝo 5: Nomado

Antaŭ ol povi decidi pri la konkretaj nomoj de la terminoj oni devas konscii pri la konsiderindaj postuloj al la terminoj kaj pri rimedoj kaj metodoj por realigi ilin. Fine ni donos praktikan ekzemplon por procedmaniero.

5.1 Postuloj al la termino

Bazaj postuloj, influantaj la ceterajn, estas:
— Termino havu a) maksimuman efikon kaj b) minimuman balaston.
a) rezultas el precizeco kaj pronoca klaro
b) rezultas el lingva (vortaro kaj vorta) ekonomio kaj minimuma memorŝarĝo: jama kono, laŭreguleco, form-analogio.
— Termino devas respondi al multaj postuloj, kiuj parte reciproke kontraŭas. En tia kazo oni zorge esploru, kiuj postulo(j) havu la prioritaton — aŭ serĉu taŭgan kompromison.

5.1.1 Stabileco de la Eo-leksiko

La ĝisnuna lingvo-uzo estu respektata. Terminoj registrataj en Eo-vortaro (precipe en PIV) ne estu ŝanĝataj sen deviga neceso. Oni pripensu, ke kreo de nova vorto apud jam ekzistanta signifas kreadon de sinonimo. Ne kreu novan nomon sen konsultado de la plej gravaj Eo-fontoj!

5.1.2 Internacieco (deriveblo/produktivo)

Laŭ ĝis nun valida difino internacia vorto estas vorto komprenebla por parolantoj de greklatin-devenaj hindoeŭropaj lingvoj kaj, pro la tutmonda influo de la grekolatina civilizo, probable por la tuta (scienca) mondo. Sed lastatempe ekkreskis la konsidero ankaŭ de aliaj etnolingvoj.
Se internacie ekzistas diversaj formoj kiuj povus servi kiel modelo por Eo-termino, oni konsideru la signifon (rangon) de la fontolingvoj por la koncerna fako (ekz. la angla por terminoj pri elektroniko kaj sporto, la itala pri muziko).
Esperantigante terminon el moderna lingvo oni devas elekti inter skriba kaj prononca formoj (fuelo el E: *) fuel, sed: vodvido el F: vaudeville) aŭ trovi kompromison (futbalo el E: football). Ĉar plejparto de la scienca/faka komunikado okazadas skribe, ĝenerale preferindas esperantigo de **skribaj** formoj. Tiel estiĝas internacieco laŭ **ekstera formo** kiu povas esti grava memorhelpo (ekz.: statistiko, sputniko, lasero, ikebano).
Sed eblas ankaŭ „prunta" traduko laŭ la **„interna formo"** (neĝborulo el F: perce neige; ruĝgorĝulo el D: Rotkehlchen)
Konsideru internajn formojn en diversaj lingvoj kaj elektu la plej konvenan! Atentu internaciecon de interna formo!

5.1.3 Vortara Ekonomio

Laŭeble oni limigu la pliampleksigon de la Eo-leksiko per
a) evito (forigo) de sinonimoj (vd. 5.2.2).
b) Elekto de radikoj, kiuj permesas liberan derivadon de ĉiuj bezonataj (kaj antaŭvideble bezonotaj!) formoj kaj formadon de termino-klasoj
c) Utiligo de polisemio (vd. 5.2.3), amplekSigo de signifo de ĝeneral-lingva vorto aŭ ties metafora uzado.
Lerta kunmetado de oficialaj radikoj preferindas al inventado de arbitre formitaj neologismoj.

5.1.4 Motiviteco

Nomo de nocio laŭeble respondu al ĝia enhavo kaj amplekso. Per aliaj vortoj: termino estu motivita per la plej esenca propreco aŭ rilato de la objekto, kiu ĝin distingas disde la ceteraj samklasaj objektoj. (rulŝtuparo kompare al eskalatoro)

5.1.5 Vorta ekonomio (koncizo; manipuleblo)

Koncizo estas forlaso de ĉio kio ne necesas por signado de nocio-enhavo.
Ju pli termino estas uzata, des pli gravas ĝia facila manipuleblo. Mallongaj vortformoj

*) por mallongigo de lingvoj ni provizore aplikas la normon V DIN 2335 (01.76), ĝis aperos la reviziata ISO R 639

do preferindas al pli longaj (ekz. „organizo" al „organizacio").
(Pri eblecoj de mallongigo vd. 5.2.4)
Rim: rilate al la kontraŭdiraj postuloj 5.1.4 kaj 5.1.5 validas la principo de „sufiĉo kaj neceso": en la konstruon de vorto oni devas enkonduki ĉiujn vortradikojn, afiksojn kaj finajojn, kiuj **necesas,** sed ne pli ol kiom **sufiĉas** por elvoki klare kaj plene la ideon reprezentotan. (formulo de la Akademio)

5.1.6 Unusignifeco

Ĉiu nomo laŭeble rilatu nur al unu nocio kaj ĉiu nocio nur havu unu nomon. (foresto de homonimoj kaj sinonimoj) Ĉar tiu (ideala) postulo konfliktas kun postulo 5.1.3, oni atentu, ke termino minimume estu **unusignifa en sia fakoj** laŭbezone ĝi estu precizigebla per atributo aŭ kunteksto (principo de laŭnecesa unusignifeco).
Ekz.: „konko" havas unu ĝeneralan signifon. Ĝi aplikeblas kiel unusignifa, nemiskomprenebla termino (kun tre diversaj difinoj) en pluraj fakoj: zoologio, arkitekturo, anatomio, mitologio, telekomunikado, ŝtalproduktado. En la lastaj du eblas laŭbezona precizigo: aŭdkonko (de telefono), fandokonko (formujo por enfandi ŝtalblokon).
Sed „konko" estas **„ununoma":** ĝi ne havas sinonimon kaj per tio ĝi plenumas gravan postulon: sinonimoj evitendas, eĉ se ili estas aplikataj en diversaj fakoj (ekz.: en D „por bielo" ekzistas 4 diversaj ekvivalentoj laŭ tio ĉu temas pri aŭto, lokomotivo, segmaŝino aŭ ĝenerala maŝinkonstruado!)
(escepto: allaso de populara apud scienca nomo, ekz. kapdoloro apud cefalalgio, neĝborulo apug galanto, subnocio apud hiponimo.)

5.1.7 Reguleco (simetrio, analogeco)

Terminoj apartenantaj al unu klaso (grupo) estu formataj laŭeble sammaniere. Esperantigante vorton oni laŭeble konservu unuformigajn trajtojn de la fontvortoj uzante analogan transskribon.
Esperantaj terminografoj uzu la ŝancon por reguleco kaj simetrio, kiuj en la nacilingvoj estas malfacile atingeblaj pro „natura evoluo" kaj enradikiĝo de formoj en la tempo antaŭ celkonscia terminologio-normigo.

5.1.8 Belsoneco (prononca klaro kaj facilo)

Ankaŭ koncerne sonkombinado oni atentu la postulon de internacieco kaj pripensu, ke naciaj parolkutimoj diferencas.
Elektu formojn, kiuj facile legeblas, klare kompreneblas kaj elegante prononceblas por laŭeble multaj homoj.
Pro tio en novaj vortoj oni evitu laŭeble, „kunmetitajn" konsonantojn, kiuj por multaj parolantoj estas malfacile prononceblaj.
Evitendas ankaŭ tro longaj vortoj („biletutiligkondiĉaro") kaj amasigo molaj kaj duraj konsonantoj („fandforno", „montgrimpanto").
(Minimume faciligu prononcon per disigostreketo: „mont-grimpanto" . . .)

5.1.9 Komputeblo

Ne laste pripensu ke termino devos taŭgi ankaŭ por prilaborado pere de komputiloj, traduk-aŭtomatoj, elektronika termino-stokado).

5.1.10 Fundamenteco

La termino ne konfliktu kun la Fundamento de Esperanto.

5.2 Rimedoj kaj metodoj por nomado

5.2.1 Transpreno de jam ekzistanta nomo

a) kun taŭga difino (konvena al la konkreta terminaro)
b) per precizigo de la difino

5.2.2 Elekto

de plej taŭga nomo el pluraj jam ekzistantaj (sinonimoj). Evtl. distingu inter „preferinda" (norma) kaj „malrekomendinda" nomoj (komputilo; komputoro, komputero) aŭ inter pli vasta/malpli vasta signifoj komputilo > komputoro). Se necesas elekti inter sinonimoj kun ekvivalentaj (egalvaloraj) signifoj, validas jena preferordo por la nomoj:
a) nomoj kiuj rilatas al esence propraj, neforigeblaj, prefere percepteblaj signiferoj (formo, koloro, materialo, temperaturo ktp.)
b) nomoj kiuj rilatas al la uzo, utiligo, apliko de la objekto
c) nomoj kiuj rilatas al la deveno (procedo de fabrikado, nomo de inventinto, lando de estiĝo ktp.)
(Ekz.: „konveksa lenso" preferendas al „kolekta lenso")

5.2.3 Utiligado de polisemio (homonimeco) (signifo-transigado)

Ĉar la nombro de nocioj en iu fako proksimume 1 000- oble superas la nombron de vortradikoj, vortara ekonomio (kp. 5.1.3) postulas, ke sama vorto estu utiligata en diversaj fakoj. Se tiuj fakoj estas sufiĉe malproksimaj unu de la alia, miskompreno ne povos okazi. (Ekz.: zoologon ne ĝenos, ke lia termino „konko" ankaŭ uzatas en anatomio, arkitekturo kaj aliaj fakoj — kp. 5.1.6). Tian transprenon de termino el alia fako aŭ el ĝenerala leksiko oni nomas „signifo-transigado" aŭ **„metafora uzado".**
„Hazardo-homonimoj" nur havas saman eksteran (skriban) formon (ekz.: bastono, bastono). Ankaŭ ili ne ĝenas sin reciproke, se ili aperas en sufiĉe malproksimaj fakoj (ekz.: „monopolo" en ekonomio kaj magnetiko). (Kp. ankaŭ 5.1.6)

5.2.4 Mallongigo

Por kontentigi la postulon pri koncizo kaj facila manipuleblo (5.1.5), internacie kreskas la tendenco al mallongigo de vortoj, vort-kunmetaĵoj kaj vort-grupoj. Temas pri forlaso de unu aŭ pluraj partoj el kompletaj terminoj. I. a. eblas
a) rekta mallongigo (mallongigita sonformo, apokopo, transprenitaj el alilingvaj fontoj):

aŭto	el aŭtomobilo
buso	el omnibuso
foto	el fotografajo

b) **ne-prononca** mallangigo; litera simbolo por fundamentaj sciencaj nocioj:
s-ro sinjoro
d-ro doktoro
prof profesoro
inĝ inĝeniero
cm centimetro
kg kilogramo
h horo

c) prononca **(literumata)** mallongigo:
ktp „kotopo" kaj tiel plu
UEA „uea" Universala Esperanto Asocio
PV „po vo" Plena Vortaro

d) akronimo (mallongigo formita el komencaj literoj aŭ silaboj de kelkaj vortoj kaj uzata kiel **parolata** vorto):
— radar(o) el E:
radio **de**tecting **a**nd **r**anging
— laser(o) el E:
light **a**mplification by **s**timulated **e**mission
(Eo: **l**um-**a**mplifo per **s**timulata **e**ligo de **r**adioj)
— INFOTERM el E:
International **Infor**mation Centre for **Term**inology
— PIV el Eo:
Plena **I**lustrita **V**ortaro
— ISAE el Eo:
Internacia **S**cienca **A**socio **E**sperantista

Atentu: por komunaj vortoj uzu minusklojn, sed majusklojn por propraj nomoj (de landoj, organizoj, libroj . . .)

5.2.5 Kreado de nova vorto

a) el Eo-morfemoj: derivado per afiksoj, kunmetado de vortoj, vort-grupigo, signifotransigado (vd. 5.2.3), prunta traduko (kp. 5.1.2)

b) el internaciaj (prefere grek-latinaj) radikoj (kp. 5.2.1); atentu la 15an regulon de la Fundamento: transprenu nur la bazan vorton, konstruu la derivaĵojn laŭ Eo-gramatiko (ekz.: operaci/o, -a, -i, -ejo, post-a k. t. p.)
Por substreki nocio-nuancojn aŭ diferencigi inter diversaj fakoj, oni povas

1) preni samsignifajn radikojn el la latina kaj greka lingvoj kaj doni al ili diferencajn signifojn. (tiel estiĝis: kompono kaj sintezo, lingv(ist)iko kaj filologio, pomologio kaj karpologio)

2) modifi la transprenitan vorton (sugesto — sugestio, kompono — komposto — kompoto)

3) por eviti ŝajn-afiksajn finaĵojn eblas ŝanĝi literon (pendolo el L: pendulus, planedo el D: Planet) aŭ mallongigi la vorton (taĉmento el F: **dé**tachement, krepusko el F: crépus**cule**)

Atentu:
a) Esperantigante vortojn kiuj havas saman eksteran formon en pluraj lingvoj, oni evitu trompiĝon per **„falsaj amikoj"**: similaspektaj vortoj (eĉ el la sama fonto) eble dum la evoluo alprenis diversajn signifojn (D: Deformation = misformado, F: déformation = formŝanĝado; D: kalt = malvarma, I: caldo = varmega; Eo: benzino = D: Benzin = E: petrol, dum E: petroleum = D: Petroleum = Eo: nafto (= kruda petrolo)

b) Se konfliktas facila (por hind-eŭropano) rekonebleco („internacieco") kaj strikta reguleco, oni laŭeble preferu la lastan, se ne gravaj argumentoj en la konkreta fako kontraŭas tion.

c) Dum ĉiuspeca nomado, ĉu elekto, transpreno aŭ kreado, oni zorge esploru, al kiu **gramatika kategorio** apartenu la **baza vorto** (la ĉefa objekto) de la termino. La formon de la derivaĵoj influos la fakto ĉu temas pri substantivo (o-vorto), adjektivo (a-vorto) aŭ verbo (i-vorto). Se temas pri verbo, nepre indiku ĉu ĝi estas **transitiva** aŭ **netransitiva**.

5.3 Praktika ekzemplo por procedmaniero

Konsiderinte la antaŭajn atentigojn kontrolu, ĉu por iu nocio fiksita per difino jam ekzistas **unu** taŭga nomo, kiu respondas al la postuloj" (5.1). Se jes, notu ĝin (kun fonto[j]). Se ekzistas **pluraj** nomoj (sinonimoj) aŭ mankas nomo **(breĉo)**, vi devos elekti resp. krei nomon por la difinita nocio. (vd. **„rimedoj"** [5.2]).
Atentu, ke ankaŭ nomoj kaj iliaj interrilatoj laŭeble klare spegulu la nocio-sistemon!
Per la nomado via sliparo kompletiĝos. Ĝi ankaŭ nomeblas **„labor-manuskripto"**. Sufiĉe „maturiginta" ĝi estas transformebla al **„diskuto-manuskripto"**: la indikoj de ĉiuj dokumentaj slipoj por unu artikolo estu kunigitaj sur unu slipo kun:
— kuranta numero UDK (aŭ alia klasifika) kodo,
— Eo-nomo (termino) (kun fonto):
E (angla ekvivalento)
F (franca ekvivalento)
R (rusa ekvivalento)
(aliaj etnolingvoj laŭ ISO-ordo)
— dato de prilaborado
— signo de prilaboranto

Ekzemplo de slipo (A 6) modifita laŭ Slipara Vortaro de R. Eichholz:

483 UDK 666.1.032

parisono (sz)

: varmega, interne kava, vitro-maso sur la fino de longa tubo, blovata de vitro-faristo al botelo aŭ alia vitra objekto. (DB 155/15)

E parison

F paraison (f)

R

D Külbel, Kölbchen (n)

75/32 a (sz)

(Pluraj tiaj slipoj povos esti gluataj sur paperfolion — ekz. 4 slipoj A6 sur folion A4 —; multobligite tiuj folioj povos esti dissendataj al la kunlaborantoj, korektataj, denove dissendataj k. t. p. kaj fine de la procedo servi kiel **prespreta manuskripto**. Duonigite tiuj folioj povus fariĝi bazo por „slipigeblaj" terminaroj en la formato A5)
Se vi (via komiisono) kreis **novan** terminon (neologismon), speciale atentigu pri tio por faciligi la laboron de reviziantoj.

Se, en ekstrema kazo, necesas **ŝanĝo** de jam uzata termino, precipe akcentu tion — sed pripensnu, ke realigado de tia ŝanĝo postulos enorman fortostreĉon kaj ĉiam minacas per ekesto de sinonimoj. Fine de la laboro kontrolu, ĉu ĉiuj difinoj klare kompreneblas; se jam difinita termino uziĝas en difino, referencu al tiu termino. Per tio vi substrekos la koherecon de via sistemo kaj helpos al la uzonto!
Laŭalfabeta listo de terminoj (indekso) kompletigas sisteman terminaron. Necesas aparta indekso por ĉiu el la uzataj lingvoj.

Literaturo

Bednařik, A:
Bazaj principoj de Esperanto Terminologio, en: Kontribuo al Lingvaj Teorio kaj Praktiko II, SEA, Poprad 1984

Blanke, D.:
Esperanto und Wissenschaft, Berlin 1982

Dellian, K.:
Principoj de Terminara Kreado, en: Sennacia Revuo, jaro 1955, n-ro 83, p. 54 — 56

DIN 2331 (04. 80):
Begriffssysteme und ihre Darstellung, Beuth Verl. Berlin 1980

V DIN 2333 (09. 74):
Fachwörterbücher, Stufen der Ausarbeitung, Beuth Verl., Berlin 1974

V DIN 2335 (01. 76):
Sprachenzeichen u. ihre Ergänzung durch Länder- u. Autoritätszeichen. Beuth Verl. Berlin 1976

V DIN 2339 T. 1 (08. 82):
Ausarbeitung und Gestaltung von Veröffentlichungen mit terminologischen Festlegungen — Stufen der Terminologiearbeit, Beuth Verl., Berlin 1982

Eichholz, R.:
Provizora Labor-plano (Cirkulero TC 75/1) Bailieboro, Kanado, 1975

Felber, H.:
The General Theory of Terminology and Terminography. Anticipated developments in the Eighties, en: Infoterm Series 7 „Terminologies for the Eighties", München 1982, p. 119 — 136

Golden, B.:
Principoj por ortografiaj normoj en Esperanto, en: Bulgara Esperantisto 83/11

Haferkorn, R.:
La intersimiligo de naciaj fakterminoj en la teknika komitato TC 37 „Terminologio", en: Scienca Revuo, Vol. 8, n-ro 1-a (29-a) 20-IV-1956, p. 31 — 34

Haferkorn, R.:
Internacia lingvo-normigo en scienco kaj tekniko — Esperanto aŭ Interlingua? en: Scienca Revuo, Vol. 10a n-ro 4-a (40-a) 1-IV-1959, p. 146 — 150

Haferkorn, R.:
Pri la interegaligo de la faklingvoj, en: Scienca Revuo, vol. 14-a, n-roj 3—4 (55/56) 10. 6. 1964, p. 81

Haferkorn, R.:
Kion niaj fakvortaristoj devas atenti? Laborplano por verkado de memstara esperanta fakvortaro konsistanta el unuformaj diversfakaj eroj (ISAE TC 111), en: Scienca Revuo Vol. 15-a, n-roj 1—2 (57/58) 29. 1. 1965, p. 7 — 23 kaj vol. 16-a n-roj 3—4, p. 73 — 74

ISO R 704 (1968):
Naming Principles, Geneve 1968 (Nom-Principoj; Eo-traduko far C. Fisher, ne publ.)

ISO R 919 (1969):
Guide for the preparation of classified vocabularies, Geneve 1969 (Gvidilo por prepari klasifikajn vortarojn; Eo-traduko far C. Fisher, ne publ.)

ISO R 919 (1969):
Vocabulary of Terminology, Geneva 1969 (Terminaro pri Terminologio, Eo-traduko far C. Fisher, rev. versio R. Eichholz 1984, ne publ.)

Jones, Kent:
Terminara konstruo laŭ ISO R 919, Chikago 1979

Krause, E.-D.:
Richtlinien zur lexikographischen Arbeit, Leipzig 1981 (manuskripto)

Kalocsay, K./Waringhien, G.:
Plena Analiza Gramatiko de Esperanto, UEA, Rotterdam 1980

Nedobity, W.:
Key to International Terminology, en: Infoterm Series 7 „Terminologies for the Eighties" Saur KG München 1982, p. 306 — 313

Neergaard, P.:
Fremdvortoj en Esperanto, SAT, Parizo 1933

Neergaard, P.:
Rimarkoj pri kelkaj terminologiaj principoj, Scienca Revuo, vol. 8 n-ro 2(26) 15. 5. 1955, p. 43 — 61

Stoberski, Z.:
Guidelines for the Adoption of New Scientific and Technical Terms, en: BABEL 21 (1975), p. 16 — 20

Szerdahelyi, I.:
La leksikografiaj problemoj de la terminologio, en: Planlingvistiko n-ro 6, jaro 2, somero 1983, p. 1 — 3

Waringhien, G.:
Plena Illustrita Vortaro — Parizo 1970, p. IX — XX

Werner, J.:
Faklingvaj principoj de vorta elekto kaj formigo. En SAEST 1980, kolekto de referaĵoj de seminario AEST, Usti nad Labem 1980, p. 56 — 62

Werner, J.:
Terminologiaj instigoj el Bad Saarow, en: Budapeŝta Infnormilo 83/2, p. 13 — 15 kaj 83/3, p. 11 — 13

Werner, J.:
Esperanta terminaro de terminologia fako, Praha 1982 (studmaterialo por Bad Saarow)

Wüster, E.:
Esperantologiaj principoj, en: Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana (A—K); Ferdinand Hirt u. Sohn en Leipzig, Esperanto-Fako, 1923, p. (23) — (66)

Wüster, E.:
Konturoj de la lingvonormigo en la tekniko Dansk Eo-Forlag, Aabyhoj, represo 1975

Wüster, E.:
Internationale Terminologie im Dienste der Informatik (internacia terminologio en la servo de la informatiko) en: La Monda Lingvo-Problemo, vol. 2, 1970, p. 138 — 144

Wüster, E.:
Einführung in die Allgemeine Terminologielehre und Terminologische Lexikographie, Wien 1979

Dua Internacia Metodika Seminario

En Warszawa okazis la Dua Internacia Metodika Seminario, nome ekde la 10a ĝis la 14a de aprilo 1985. Ĝin partoprenis personoj el kvin landoj — Pollando (35 personoj), Bulgario (6 personoj), Nederlando (1 persono), Hungario (1 p.) kaj GDR (1 p.).

La ĉefa celo konsistis el tri partoj: pridiskuto de metodikaj problemoj enkadre de fremdlingvo-instruado; prezento de spertoj rilate la Esperanto-instruadon; preparo de programo por kvalifiko de Esperanto-kursgvidantoj.

La gvidon de la tuta seminario prenis sur siajn ŝultrojn la prezidantino de la Pedagogia Komisiono ĉe PEA, mag. IRENA SZANSER, kiun ĉiuj ceestintoj korege dankas pro ŝia fervora, sindona, sprita laboro.

La kontribuintoj prezentis la sekvajn temojn: „La statuso de E-didaktiko kaj E-edukado" (d-ro J. LEYK), „La lernejaj reformoj kaj Esperanto en Hungario (doc. d-ro I. Szerdahelyi, prezentita de Zs. Barcsay), „Metodikaj spertoj de inspektoro pri lerneja Esperanto-instruado" (Zs. Barcsay) „Lingvoinstruado kaj lingvolernado" (R. ROKICKI), Klerigaj kaj edukaj funkcioj de E-instruado" (T. EJSMONT), „Programeroj por prepari estontajn E-instruistojn" (K. PACHOLOCZYK), „E-instruado per internacia lernolibro (AUDREY CHILDS-MEE), „Konsidero de la gepatra lingvo de lernantoj dum E-instruado" (d-ro T. DAHLENBURG). Krome estis prezentitaj tre interesaj modellecionoj (mi mencias speciale tiun de s-ino H. OLESZEK) kaj elpaŝoj de kantensemblo resp. de infana aktora ensemblo, kiuj surprizis la gastojn per ĉarmaj pol- kaj esperantlingvaj kantoj kaj per treege bone preparita prezentado de la fabelo „Cindrulino". Specialaj kunsidoj estis dediĉitaj al postulendaĵoj enkadre de metodologia preparo de E-kursgvidantoj; la detalan projekton ellaboris s-ino I. SZANSER. Konkludoj fakrilataj:

1. La instruado de Esperanto nur parte diferencas de la ĝenerala metodiko de fremdlingvo-instruado; pro tio la esperantistaro pli intense uzu la ekkonojn kaj esplorojn de koncernaj fakuloj!

2. Estas necese, ke ankaŭ la E-metodikistoj limigu ĉiun ajn subtaksadon de la edukaj kaj klerigaj potencoj de fremdlingvolernado; tio signifas unue, ke la ekzamenpostuloj estu adekvataj al tiuj, kiuj ene de la unuopaj landoj validas ankaŭ por la ekzameno surkampe de la regado de etnaj fremdaj lingvoj; kaj due, ke la kvalifiko de Esperanto-kursgvidantoj estu akompanata, interalie, de s e r i o z a studado de metodikrilataj programeroj (historio de fremdlingvo-instruado, la rolo de la gepatra lingvo dum la lernado de Esperanto, tipoj de lernolibroj, ellaboro de instruplano fare de instruisto laŭ la deviga instruprogramo ktp.)!

Resume mi povis konstati, ke kreskas realisma priktrakto de la problemaro koncerne la Esperanto-instruadon.

ti-da-g

Konferenco pri planlingvoj en Uralo

Ekde 1983 en Uralo estas organizataj UKP — uralaj konferencoj pri planlingvoj, kiuj okazas en la formo de sekciaj kunvenoj enkadre de superlernejaj konferencoj. UKP-1 okazis ĉe la Sverdlovska Pedagogia Instituto kun 10 raportoj (1983 04 30); UKP-2 — ĉe la Tjumena Ŝtata Universitato kun 4 raportoj (1984 04 19). La 3a planlingvistika konferenco okazis en Permo la 5an de aprilo ĉe la Perma Ŝtata Universitato M. Gorkij kun ĉeesto de ĉ 25 personoj: universitatanoj, uralaj esp-istoj, gazetriportisto. En la kunveno de la sekcio interlingvistiko/esperantologio estis prezentitaj 6 raportoj, el kiuj 4 estis esperantologiaj, unu koncernis la planlingvon Omo (V. Vengerov: 1926) k unu — ĝeneralan leksikografion.

1. Lozgaĉev, N. V. (Permo): La reformoj de de Ido kaj iliaj ekvivalentoj, aperintoj dum la natura evoluo de esperanto.

2. Korĵenkov, A. V. (Sverdlovsk): Ĉefaj leksikaj kaj fonetikaj specifaĵoj ĉe la esperantofonoj.

3. Gorecka, G. R. (Sverdlovsk): La planlingvo Omo.

4. Kupĝik, D. V. (Gorkij): Kompilado de la ofteca esperanto-rusa vortaro.

5. Kukuŝkina, O. A. (nGorkij): Aŭtomatizado de leksikografiaj esploroj.

6. Gadirova, D. N. (Toboljsk, Tjumena regiono): Kunmetitaj vortoj en esperanto.

Ĉiujn raportojn sekvis pluraj demandoj al la aŭtoroj. Konkludante la rezultojn de la konferenco, ties gvidanto, N. F. Ponomarjov (Filologia fakultato) menciis aktualecon de la temoj, bezonon plu esplori la problemojn k taksis la konferencon esti sukcesa. La raportintoj estis distingitaj per honorfolioj de la universitata scienca societo. La 3an UKP garnis okazinta la 6an-7an de aprilo 1985 Literatura Semajnfino kun varia kultura programo, kies ĉeftemo estis teatro.

Aleksander V. Korĵenkov

Religi malnovajn kaj komenci novajn kontaktojn

La Smolenska internacia esperanta klubo heredas la bonajn tradiciojn de Smolenskaj geesperanistoj, kiuj en la jaroj antaŭ la dua mondmilito korespondis kun samideanoj en la tuta mondo. Ili havis korespondamikojn en multaj landoj de Eŭropo, sed ankaŭ en Ameriko, Japanio, Aŭstralio. Ni tre volonte rekomencos korespondadon kun niaj iamaj leteramikoj kaj kun adeptoj de la Internacia Lingvo en diversaj landoj de la mondo. Skribu al la geesperantistoj de antikva rusa urbo Smolensk. Nia adreso: Smolenska Esperanto-Klubo, Smolensk, Poŝtkesto 105

13a SIS en Varsovio

Ni jam kelkfoje raportis en „der esperantist" (vidu 1/85) pri la „Studentaj interlingvistikaj seminarioj" kaj poste „Sciencaj interlingvistikaj simpozioj", kiujn jam ekde 13 jaroj organizas la Pola Esperanto Komitato en la kadro de la iam Socialisma Asocio de Polaj Studentoj (nun mallongigita al Asocio de Polaj Studentoj). Tiuj seminarioj celas informi pri aktualaj ĝeneralaj kaj specialaj problemoj de interlingvistiko kaj esperantologio stimulante la interlingvistikan agadon inter studentoj kaj samtempe donante al ili la eblecon prezenti antaŭ forumo siajn tezojn kaj kontribuojn. Dum la daŭro de la evoluo la seminarioj ĉiam pli kaj pli fariĝis internacia interlingvistika konferenco, kiun tute ne nur (aŭ ankoraŭ apenaŭ) partoprenas studentoj sed junaj (kaj malpli junaj) interlingvistoj kaj esperantologoj el plej diversaj landoj. Ĉijare okazis la jam 13a SIS (= Scienca Interlingvistika Simpozio) de 27a de aprilo ĝis 1a de majo en hoteleto ĉe Varsovio. Ĝin organizis la Aakdemia Centro Interlingvistika, kaj gvidis ĝin Ryszard Rokicki. Partoprenis ĉirkaŭ 43 interlingvistoj (aŭ interlingvistike interesitoj), kiuj entute prezentis 26 prelegojn i. a. pri apliko de Esperanto en la maŝintradukado, pri la landonoma problemo, vortfarado de Esperanto, problemoj de internacia komunikado k. a. El GDR partoprenis Wera Dehler, kiu prelegis pri la planlingvaj radikoj de la terminologia scienco, kaj d-ro sc. Detlev Blanke, kiu traktis la terminon „planlingvo", skizis lingvofilozofiajn kaj ideologiajn motivojn de la kreado de planlingvaj projektoj kaj koncize prezentis la pazigrafion Safo de Eckardt. La partoprenintoj venis el Bulgario, ČSSR, Finnlando, Francio, FRG, GDR, Hindio, Hungario, Japanio, Luksemburgo, Okcidenta Berlino, Pollando. Valoras mencii, ke ekzistas dua serio de seminarioj en Pollando. Temas pri la seminarioj pri la problemoj de internacia komunikado, kiun gvidas d-ro Tadeusz Ejsmont jam dum kelkaj jaroj en la Universitato Lodz. Tiuj seminarioj direktiĝas al neesperantistaj sciencistoj. Jam aperis tri pollingvaj volumoj kun kontribuoj. La eldoncentro de PEA „ritmo" celas eldoni la prelegojn de la 13a SIS. La 14a SIS okazos fine de aprilo 1986 ĉe Varsovio. La 13a SIS konvinkis min pri la celkonscia kaj aprezinda interlingvistika agado de la Akademia Centro Interlingvistika kaj la kun ĝi ligitaj aktivuloj.

D. Blanke

Prelegoj de la 13a SIS

— d-ro D. Blanke (GDR): La termino „planlingvo"
— J. Uspienski (Pollando): Monda terminologia problemo kaj Esperanto
— W. Dehler (GDR): Rilatoj inter planlingvoj kaj interncia terminologio-normigo
— d-ro T. Michalski (Pollando): Ĉu necesas paroli gramatike? Pri la juda filozofio de la lingvo
— d-ro P. Ohaloupka (ČSSR): Apliko de interlingvistiko en informatiko
— R. Schnell (Okcidenta Berlin): Interlingvistika datumbanko kiel parto de integrita esperantista informsistemo
— A. Nogata (Japanio): Eŭropisma tendenco en la evoluo de Esperanto
— Yashovardhan (Hindio): Ĉu eblas trovi lingvo-tipologiajn „hindecajojn" en Esperanto?
— d-ro K. Schubert (FRG): Agmanieroj fazoj, verbaj klasoj — serĉante interlingvistikan terminon
— R. Rokicki (Pollando): Sintaksa derivado en Esperanto
— d-ro D. Blanke (GDR): Pazigrafio „Safo" de Eckardt
— V. Oljanov (Bulgario): Infana malsano de Esperanto-revuo de provoj por reformoj de Esperanto kaj principoj de la evoluo de la Lingvo Internacia
— K. Baceva (Bulgario): Normigo de la bulgara lingvo
— R. Rokicki (Pollando): Gramatika genro de la Esperantaj radikoj
— d-ro D. Blanke (GDR): Lingvofilozofiaj kaj ideologiaj motivoj de la kreado de planlingvoj
— d-ro T. Eijsmont (Pollando): Homaj disvolvbezonoj kiel faktoro raciiganta la internacian lingvan komunikadon
— D. Maxwell (USONO): Kelkaj temoj rilate al genera priskribo de Esperanto
— d-ro B. Wacha (Hungario): Ekzisto-gradoj de lingvaj formoj
— S. Revesz (Hungario): Praraŭmismo
— I. Koutny (Hungario): Esperanto kaj maŝina tradukado
— d-ro K. Schubert (FRG): DLT
— Cl. Nourmont (Luksemburgo): Ambigueco de Esperanto
— R. Triolle (Francio): La slango de francaj lernejanoj
— H. Tautorat (Okcidenta Berlino): Kial ne eblas maŝine traduki?
— d-ro S. Dudek (Pollando): La sekreta lingvo de psikologiaj simptomoj

Esperanto en diplomdisertacio

Fojfoje Esperanto ludas rolon lige al temoj traktitaj en diplomdisertacioj en atlernejoj. 1983 Marion Knaut defendis sian disertacion „Der Anteil hallescher Rotsportler am antifaschistischen Widerstandskampf in der Interessengemeinschaft zur Wiederherstellung der Einheit im Arbeitsport und der Kampfgemeinschaft für rote Sporteinheit in den Jahren 1929 bis 1935 am Beispiel Otto Erich Bruders (1908 — 1945)" (la kontribuo de ruĝaj sportistoj el Halle al la kontraŭfaŝisma rezista batalo en la Interessocieto por rekreo de la unueco de laborista sporto kaj Batalsocieto por ruĝa sportista unueco dum la jaroj 1929 — 1935 ĉe la ekzemplo de Otto Erich Bruder (1908 — 1945)).
La disertacion akceptis la sekcio sportscienco ĉe Martin-Luther-Universitato Halle-Wittenberg. La ĉefekspertizanto estis doc. d-ro sc. Wolfhard Frost. La disertacio havas 89 paĝojn kaj 140-paĝan aldonajon kun dokumentoj.
Sur la paĝoj 15 — 23 ni trovas la ĉapitron „La aktiveco de Otto Bruders en la loka grupo Halle kaj en la distrikto Okcidenta Sakcio de Laborista Esperanto-Asocio".

TRADUK-KONKURSO TASKO 4/85

Zitate

— Denn jeder Tage Friede arbeitet für die Sicherheit und die Dauer des Friedens.
— Becher —

— Denn wo der Weg des Lebens dornig und steinig und der Kampf des Lebens hart und schwer wird, da bewährt sich erst die wirkliche Freundschaft. — Thälman —

— Um mit Erfolg für den Frieden kämpfen zu dürfen, muß man bewiesen haben, daß man es nicht aus Feigheit tut, aus Drückebergerei, sondern daß man gewillt ist, wenn es not tut, für die Sache des Friedens zu sterben. — Feuchtwanger —

— Die Menschen sollten lernen, im Frieden miteinander auszukommen. — Becher —

— Gewalt ist gar nicht so schlimm. Schlimm ist sie nur, wenn sie für schlechte Zwecke eingesetzt wird. — Feuchtwanger —

— Es gibt nur eine Gesundheit und eine Menge von Krankheiten.
— Wilhelm von Humboldt —

— Ein Mensch ohne Humor, ist überhaupt kein Mensch. — Brecht —

— In einem Land leben, wo es keinen Hunger gibt, ist unerträglich, aber nach unerträglicher ist es in einem Land, wo man Humor braucht. — Brecht —

— Der Krieg ist eine Schande, unter der ein Kulturmensch erbebt ...
— Heinrich Mann —

— Die größte Sehenswürdigkeit die es gibt, ist die Welt — sieh sie dir an.
— Tucholsky —

— Man sollte ... alle Tage wenigstens ein kleines Lied hören, ein gutesGedicht lesen, ein treffliches Gemälde sehen und, wenn es möglich zu machen wäre, einige vernünftige Worte sprechen. — Goethe —

— ... die halbe Wahrheit ist nichts wert, immer nur die ganze. — Stefan Zweig —

— ... was man als Kind ... gelernt hat, besitzt man sein ganzes Leben lang: ungeheure, unersetzliche Reichtümer.
— Becher —

— Wenn du heute nicht etwas besser bist, als du gestern warst, bist du gewiß etwas schlechter. — Ebner-Eschenbach —

— Die Wahrheit ist schwer und gefährlich; sie läßt sich eine Zeitlang bremsen und dämmen; dann aber bricht sie sich Bahn wie eine Lawine. — Fr. Wolf —

— Ein klein wenig Wahrheit schmeckt eben bitterer als pfundschwere Lügen.
— L. Grundig —

— Wer sein Vaterland nicht kennt, hat keinen Maßstab für fremde Länder.
— Goethe —

— Ich weiß nicht, ob die Liebe ein Glück ist. Jedenfalls ist sie das charmanteste Unglück, das uns zustoßen kann.
— Goetz —

(Aus: U. Eichelberger — Zitatenlexikon
VEB Bibliographisches Institut
Leipzig 1981)

Boris Kolker: Kandidato de filologiaj sciencoj

Kun plezuro mi informas vin,ke la 25-an de aprilo 1985 en la Instituto de Lingvoscienco de Akademio de Sciencoj de USSR okazis defendo de mia disertacio pri la temo „Kontribuo de la rusa lingvo al la formiĝo kaj evoluo de Esperanto". Scienca gvidanto — prof. d-ro Magomet Isajev. Oficialaj oponantoj — prof. d-ro Viktor Grigorjev kaj docento d-ro Sergej Kuznecov. Recenzanto de la kompetenta organizajo (Tartu-a Universitato) prof. d-ro Aleksandr Duličenko.
Rezulte de la sukcesa defendo la Disertacia Konsilio, konsistanta al elstaraj lingvistoj, aljuĝis al mi la sciencan gradon „Kandidato de filologiaj sciencoj" (ekvivalento al eksterlanda „doktoro pri scienca branĉo" pri la specialeco „ĝenerala lingvoscienco".

Boris Kolker

Novaj libroj el Hungario

— Endre Dudich: Ĉu vi konas la teron? Ĉapitroj el la geologiaj sciencoj. Scienca Eldona Centro de Universala Esperanto-Asocio. Budapest 1983, 150 p., ISBN 963571 0801

— Zsigmond Móricz: Varmega Kamparo. Romano. Trad. István Nagy. Lingve reviziis Wililam Auld. Hungara Esperanto-Asocio, Budapest 1985, 169 p., ISBN 963571 0496

— Petko Arnaudov / Ljudmila Arnaudova: Amuza matematiko por gelernantoj. Scienca Eldona Centro de Universala Esperanto-Asocio, Budapest 1984, 99 p. ISBN 963571 1298

— Károly Aszlányi: Sep vangofrapoj. Romano. Dua eldono. Trad. László Somlai. Hungara Esperanto-Asocio, Budapest 1984, 148 p., ISBN 963571 131X

— János Nyilasi: Molekuloj. Sciencpopulariga libro pri fundamentaj problemoj de ĝenerala, organiza, neorganiza, fizika, polimera kaj biologia kemioj. Scienca Eldona Centro, Budapest 1984, ISBN 963571 145X, 118 p. kun grafikajoj

— János Elem: Betonterapio. Teatrajo (hungara, Esperanto) Trad. Péter András Rados, Hungara Esperanto-Asocio Budapest 1985, ISBN 963571 1557, 35 p.

— Lásló Tabi: La Damo del l'Fatalo. Tragikomedio. Trad. Vilmos Benczík. Hungara Esperanto-Asocio, Budapest 1985, ISBN 963571 1549, 42 p.

GDR-anoj mendu ĉe Ungarisches Kulturzentrum, 1020 Berlin, Karl-Liebknecht-Str. 9

Pri publika klerigado

De la 21a ĝis 25a de marto 1985 en Budapest okazis internacia seminario pri „sistemoj kaj modeloj de publika klerigado", kiun organizis Hungara Esperanto-Asocio. Ĝin partoprenis pli ol 30 esperantistoj el Bulgario, GDR, Hungario, Nederlando kaj Pollando. La partoprenintoj reciproke informis sin pri la publikaj sociaj eblecoj en siaj ŝtatoj kleriĝi. De GDREA partoprenis Wera Dehler, membro de la Centra Estraro, kiu prelegis pri la eblecoj en GDR kleriĝi en plej diversaj scio-branĉoj, lertecoj kaj interesiĝoj. Ŝi aparte prezentis la specifajn eblecojn de Kulturligo de GDR. Oni ankaŭ laŭtlegis kontribuojn pri la akcelado de talentoj kaj edukado de laboruloj en Ĉinio, kiu aperis en El Popolo Ĉinio 3/1984. Wera Dehler uzis la eblecon kaj vizitis kelkajn esperantigitajn teatrajojn de Beckett, Jovkov, Kafka kaj Elem.

SAKSA KURIERO
Esperanto-Informilo eldonita de GDREA Leipzig kaj Halle

Ĉu Vi jam abonis „Saksan Kurieron?"? Ankoraŭ ne?? Neimageble! Legu „der esperantist" n-ron 2/1985, p. 46 kaj . . . abonu finfine!

Unua Internacia Festivalo

de Esperantistaj Foto-Kino-Amatoroj

Laŭ iniciato de la Sekcio de Kino-Foto-Amatroj (ILEF) ĉe Bulgara Esperantista Asocio, de la 5a ĝis la 12a de oktobro 1985 en la Internacia Esperanto-Kursejo en vilaĝo Pisanica, Bulgario, okazos la unua internacia festivalo de esperantistaj kino-foto-amatoroj, titolita „Ĉarmaj Rodopi";
En la festivalo povas partopreni ĉiu esperantisto, okupiĝanta pri fotado, filmado kaj surbendigado.
La programo de la festivalo estos riĉenhava kaj varia.
Estos organizitaj foto-ekspozicio de amatoraj fotajoj kaj projekciado de lumbildoj kaj filmoj (8 kaj 16 mm — koloraj kaj nigra-blankaj). Preferinde la formato de la fotojkonkursajoj, koloraj kaj nigra-blankaj, estu 30/40 cm aŭ 24/30 cm.
La premiitaj fotoj estos publikigitaj en la revuoj „Bulgara Esperantisto", „Internacia Jurnalisto" kaj en aliaj E-eldonoj.
Dum la tagoj de la festivalo estos organizitaj: konciza kvalifika kurso de fotado kaj filmado: ekskursoj al la intermonto de Trigrad kaj la kaverno „Diabla gorĝo", al la ripozloko Pamporovo kaj montopinto Snejanka kun la televida turo; al la mezepoka kastelo Agušev konak; vizito de urbo Smoljan kaj de la planedario, renkontiĝo kun la membroj de la esperantista kino-foto-klubo „Eŭridika" en Smoljan, k. a.
Ĉiuj esperantistoj kino-foto, magnetofonamatoroj estas invitataj partopreni tiun ĉi unikan festivalon, pasigi agrablajn horojn en faka esperantista medio, ĝui la belecojn de Rodopi-montaro kaj filmi ilin. La Internacia Esperanto-Kursejo disponigos al la partoprenantoj komfortan restadon kaj bongustajn rodopajn manĝajojn. Restadkostoj: 100 lv. pagotaj surloke.
Por pliaj informoj vin turnu al la Sekcio de Kino-Foto-Amatoroj ĉe BEA, bul. Hristo Botev 97, 1303 Sofio, Bulgario.

MALFERMITA LETERO AL LA NACIAJ KOOPERATIVAJ ORGANIZOJ

Estimataj Kolegoj,
Inter la nunaj streĉitaj cirkonstancoj la plej grava afero por ni ĉiuj estas certigi la pacon, malkreskigi la minacitecon de la homaro kaj urĝigi la malarmadon. La solvon de tiuj gravegaj problemoj helpas en signifa mezuro ankaŭ la internaciskalaj interpersonaj kontaktoj, en kiuj la ekzisto aŭ manko de konvena komunika kodo povas baze influi la kvaliton de tiuj rilatoj. Ĝuste tial ni strebas altigi la fremdlingvan klerecon de la kooprativanoj, ĝuste tial ni subtenas la lernadon de ĉiuj fremdaj lingvoj inter ili aparte tiun de la internacia lingvo Esperanto.

Ni, la subskribintoj de tiu ĉi letero, spertis en la praktiko dum longaj jaroj, ke Esperanto estas plene taŭga por la personaj internaciaj kontaktoj de la opaj kooperativanoj, eĉ por la plej altnivelaj traktadoj inter landaj kooperativaj organizoj. Estas aparte favore, ke en vasta rondo de la kooperativanoj Esperanto estas relative rapide disvastigebla — kiel tion pruvas niaj spertoj, kiujn ni volonte disponigos al la kooperativaj organizoj. Dum mallonga tempo en pluraj dekoj da landoj formiĝis aro da kooperativaj fakuloj, kiuj Esperanton regule uzas en siaj fakaj kaj personaj interrilatoj.

Post pluraj sukcesaj internaciaj renkontiĝoj, kunvenoj kaj konferencoj la kooperativaj esperantistoj decidis organizi la III-an Kooperativan Esperanto-Konferencon okaze de la „Internacia Jaro de la Junularo". Tiu grava internacia evento okazos en urbo Plovdiv (Bulgario) inter la 27-a kaj 30-a de septembro 1985. La ĉefa temo estas „Junularo en la kooperativoj". La laborlingvo estos Esperanto, kaj nature estos pritraktata ankaŭ la stato de la kooperativa Esperanto-movado en la opaj landoj.

Aludante pri la fakto, ke la internacia lingvo jam modele funkcias ankaŭ en internacia kooperativa movado, ni konstatas, ke estas nepreterpasebla tiu fenomeno kaj por la kooperativaj organizoj estas bezone akiri fidindajn informojn pri ĝi. Tial ni ofertas al ĉiuj la eblon sendi viajn reprezentantojn al nia konferenco, respektive ekhavi ĝiajn dokumentojn.

Por pliaj informoj turnu Vin al:

Centra Kooperativa Unuiĝo
Kooperativa Epseranto-Sekcio
Strato „G. Rakovski" 99
1000, Sofia — Bulgario

Esperante je fruktodona kunlaboro por la supre skribitaj noblaj celoj, respektas Vin kun kooperativaj salutoj Viaj

D-ro Jozsef Pál	Milan Milanov
prezidanto	prezidanto
de la hungara	de la bulgara
Kooperativa	Kooperativa
Esperanto-Komisiono	Esperanto-Sekcio

Sofia, la 15-a de novembro 1984

12-a plenkunsido de la Centra Estraro

La Centra Estraro de GDREA havis sian 12an plenkunsidon la 24an de majo 1985 en Magdeburg. La prezidanto de GDREA, **Hans Heinel,** prezentis en sia enkonduka, referajo la gravajn sekvojn de la liberigo el sub la faŝisma jugo antaŭ 40 jaroj i. a. por la renaskiĝo de kultura vivo sur la teritorio de la iama Germanio. La liberigo donis la eblecon por fondo de la iama Kulturligo por Demokratia Renovigo de Germanio, la hodiaŭa Kulturligo de GDR, en kies kadro organizite la esperantistoj laboras dum 20 jaroj. Valoras substreki, ke jam iom post la fondiĝo de Kulturligo en ties kadro ankaŭ ekaktivis unuopaj Esperanto-grupoj.
La ĉefa tagorda punkto estis la problemaro de junulara laboro en GDREA. 5-kapa gejunula grupo tre bone prezentis siajn imagojn kaj proponojn kaj rezultigis konstruivan diskuton. La Centra Estraro de GDREA akceptis kiel Junularan Estraron de GDREA jenajn personojn: **Detlev Kraus, prezidanto, Andreas Penk kaj Torsten Bendias, vicprezidantoj, Sylvia Lassika, redaktorino de la Junulara Cirkulero, Christian Schmitz kaj Maik Jung, membroj.**
La prezidanto kaj la sekretario de GDREA krome informis pri la ĉefaj rezultoj de la 18a Konsultiĝo, kiu okazis dum aprilo 1985 en Pisanica, Bulgario.
Plua grava punkto estis la analizo de laborplanoj de la distriktaj estraroj de 1984 kaj 1985, kiun prezentis **Siegfried Linke.** Sekvis diskutoj pri faka agado kaj multaj raportoj kaj informoj. La Centra Estraro konfirmis kiel novajn membrojn la prezidantojn de la Distriktaj Estraroj Leipzig, **D-ro Helmut Werner,** kaj Suhl, **D-ro Hans Rogazewski.**

Rilatoj al junpioniroj el Leningrad kaj Max Hoelz

Pri la fama germana revoluciulo Max Hoelz antaŭnelonge aperis la libro „Max Hoelz" de Manfred Gebhardt, Neues Leben, Berlin 1983. Sur paĝo 302 oni legas:
„En la nomo de la Ruĝaj Junpioniroj el la patria Vogtlando li (t. e. Max Hoelz — la red.) jam 1930 sugestis kontrakton pri konkurso inter germanaj kaj leningradaj pioniroj. I. a. al la sindevigoj de la leningradanoj apartenis . . ., aktivigi la laboron de la Esperanto-kurso . . ."
Ĉu iu scias detalojn pri la menciitaj rilatoj?

Al Erfurt kaj Hajdu Bihar

La Junulara E-klubo el la litova ĉefurbo Vilnius serĉas kontaktojn kun la samaj kluboj el la urboj, kun kiuj Vilnius havas ĝemelrilatojn, t. e. Erfurt en GDR kaj hungara regiono Hajdu Bihar. Ni dezirus korespondi pri niaj urboj, popolaj kutimoj, E-agado k. t. p.
Ni komencas fari kolekton de koloraj bildkartoj „Mondo pere de bildkartoj", kiu estos prezentata dum diversaj E-aranĝoj. Tial ni petas gesamideanojn en diversaj landoj sendi por ni belan bildkarton de sia urbo. Ni ĝojus sur la dorsa flanko de la bildkarto trovi kurtan informon pri la proksimuma nombro de geesperantistoj aŭ E-kluboj en la koncerna urbo. Ĉiu skribinto ricevos belan poŝtkarton de la litova ĉefurbo Vilnius.
Korespondajojn ni atendas laŭ la adreso: E-klubo „Juneco", P. O. Box 61, 232000 VILNIUS-C, Litovio. Validas ĉiam! „Juneco"

BÜCHER, IN DENEN ESPERANTO ERWÄHNT WIRD

Claude NOURMONT arbeitet an einem Verzeichnis von Werken der nationalsprachlichen Literatur (vor allem Romane u. ä.), in denen Esperanto irgendwie erwähnt wird, und bittet alle, die solche Fundstellen kennen, ihr genaue Angaben mitzuteilen über: Autor, Titel des Werkes, Verlag, Datum der Ausgabe, sowie Seitennummer der Erwähnung in der betreffenden Ausgabe. Bei Übersetzungen bitte die Sprache des Originals angeben. Für Zitate in der Originalsprache wäre eine Fotokopie des Textes willkommen.
Anschrift für alle solche Auskünfte, die dankbar erhalten werden:
Frau Claude NOURMONT, 2 em Kläppchen, L—5682 DALHEIM, Luxemburg.

Serĉata

D-ro Erich-Dieter Krause (7010 Leipzig, Semmelweisstraße 7) serĉas jenajn revuojn:
juna amiko: n-roj 11 — 13, 15, 19, 21
Homo kaj Kosmo: 1974: 2,3
Literatura Foiro: n-roj 1 — 3, 5, 7 — 10, 17 — 38
Starto (de ĈEA): n-roj 58, 59 (jaroj 1976/77)
Hungara Vivo: 1961: 1, 2, 1963: 3, 4, 1964:
La Migranto (de TANEF): n-roj 78, 80 — 83,
Heroldo de Esperanto: 1970: 1484 — 1491, 1494 — 1499, 1971: 1507 — 1508.
El Popola Ĉinio: 1980: 1 — 4, 6, 10 — 12, 1981: 1, 4 — 9, 11 — 12, 1982: 3 — 6, 8 — 11, 1983: 10, 11.
esperanto: n-roj 796, 830, 838 — 840, 843, 850 — 851.

GDREA kore gratulas

al jenaj elstaraj hungaraj esperantistoj, kiuj estis distingitaj okaze de la 40a datreveno de la liberiĝo de Hungario:
— D-ro Ferenc Nezvál, eksministro pri justico, parlamentano, prezidanto de HEA, ricevis Laŭrokronan Flagordenon de la Hungara Popolrespubliko.
— Imre Kutas, eksambasadoro, estrarano de HEA, ricevis ordenon „Pro la Socialista Hungario".
— D-ro Imre Pethes, eksa vicfaksekciestro de Ĉefa Direkcio de Hungaraj Ŝtataj Fervojoj, vicprezidanto de HEA, ricevis la novfonditan ordenon „La 4a de Aprilo".
— D-ro Árpád Rátkai, katedestra lekciisto, ricevis bronzan gradon de „Ordeno de Laboro".

Brazila peto

En la jaro 1824 elmigris la germana familio Heringer al Brazilo. Anoj de tiu familio ankoraŭ vivantaj en GDR petataj skribi al „Heringer-movado", R. Barbara Helvadora 983. Centro. 35100 Gov. Valadares M. G.

Laste aperis

Ne libroofertol Nur bibliografiol

— Bulgara-Esperanto vortaro. Violin Oljanov k. a. Sofio: Nauka i Izustvo, 1981. 430 p. 21 cm. Bind. Ampleksa vortaro kun ĉirkaŭ 16 500 artikoloj.

— Centa simio, La (1902), Ken Keyes Jr. El la angla trad. Joek Naber-Keller. Hago: Internacia Esperanto-Instituta, 1984. 135 p. Ilus. 20 cm. Kolekto de opinioj kaj komentoj pri la nedezirindeco de nuklea malarmado.

— Enkonduko en la kategoriojn de Aristotelo,, Porfrito la Fenica (232 — 305). El la pragreka trad. Evaldo Pauli. Chapecó: Fonto, 1983. 79 p. 21 cm. Biblioteko de Filozofio: Serie „Klasikuloj de la Filozofio", Traktado de logiko de fama helena filozofo, kiu havis grandan influon al la mezepoka instruado de la filozofio en Eŭropo.

— Esperanto and Machine Translation, Ian D. K. Kelly. Londono: Esperanto Centre, 1983. 4 p. 30 cm. Anglalingva informbroŝuro pri la utilo kaj stato de Esperanto en maŝina tradukado.

— Lasu min paroli plu! Claude Piron (1931). Chapecó: Fonto, 1984. 127 p. 21 cm. Lingvo-instrua romano kun paralelaj tekstoj al Gerda malaperis! de la sama aŭtoro, celanta malkovri al la leganto la esprimpovon de Esperanto.

— Max kaj Moritz; Buba rakonto en sep petoloj (1864), Wilhelm Busch (1832 — 1908). El la germana trad. Franz Döring 1889 — 1959). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1984. 58 p. Ilus. 21 cm. Jubilea Eldonserio: 2 Beletro tradukita 8. Amuza, abunde ilustrita poemo por infanoj, de unu el la fondintoj de la germana bildstria arto.

— Morto kaj la morto de Kinkas Akvobleko, La (1961), Jorge Amado (1912). El la portugala trad. Geraldo Pádua. Chapecó: Fonto-Serio n-ro 1. Parto de la pli granda verko La malnovaj maristoj de brazila verkisto, konata i. a. pro kunplekto de sociaj kaj lirikaj elementoj; kun biografio.

— 80 Jahre Esperanto-Gesellschaft Frankfurt am Main E. V., 1904 — 1984. Frankfurt am Main: Esperanto-Gesellschaft, 1984. 32 p. Ilus Mimeo. 21 cm. Artikoloj kaj informoj okaze de la 80-jara jubileo de la Esperanto-Societo de Frankfurt am Main.

— Perfektigo de la evoluinta socialismo kaj lukto por la paco sur la planedo, K. U. Ĉernenko. El la rusa trad. L. Novikova kaj V. Arolovič. Moskvo: Novosti (APN), 1981. 62 p. 20 cm. Oficiala parolado.

— Pri dubo kaj certeco. Evaldo Pauli (1924). Chapecó: Fonto, 1984. 162 p. 21 cm. Biblioteko de Filozofio. Traktaĵo de universitata profesoro pri la gnozeologia problemo — la demando pri nia konkapablo.

— Rekta pensado. Evaldo Pauli (1924). Chapecó: Fonto, 1984. 149 p. 21 cm. Biblioteko de Filozofio: Serio „Edukada". Studo de universitata profesoro pri la pensado sub la sekcioj „Intelektisma edukado", „Menso bone farita por plibone funkcii", „Plenigo de kapo, ne facila afero".

— Sankta Biblio, La. La Malnova Testamento, laŭ la masora teksto, tradukita de L. L. Zamenhof; la Nova Testamento, laŭ la teksto de Nestle, tradukita de Brita Biblia Komitato; ambaŭ tradukoj reviziitaj de tiu komitato. Londono/Edinburgo: Brita kaj Alilanda Biblia Societo/Nacia Biblia Societo de Skotlando, 1984 (represo). 771 + 225 p. 19 cm. ISBN 5 564 001 38 4.

— Al la nuklea epoko — pacan kodon; „6 principoj" de Konstantin Ĉernenko — normoj de interrilatoj de la nukleaj regnoj, Vladlen Kuznecov (1931). El la rusa trad. A. Ŝakarov. Moskvo: Novosti (APN), 1984. 14 p. 20 cm.

— Amuza matematiko por gelernantoj, Petko Arnaudov kaj Ljudmila Arnaudova. El la rusa trad. la aŭtoro. Budapeŝto: Scienca Eldono Centro de UEA, 1984. 99 p. Ilus. 21 cm. ISBN 963 571 129 8. Populara prezento de la matematiko per variaj problemoj kaj tekstoj — eĉ poemoj — por diversaj gradoj; abunde ilustrita per desegnaĵoj kaj figuroj.

— Fajro kuracas (1932), Eŭgeno Miñalski (1897 — 1937)?). Osaka: L'omnibuso 1984 (2a eld.). 50 p. 19 cm. Represo de poemaro de la plej granda el la siatempa skolo de proletaj Esperanto-verkistoj, kiu posedis eksterordinaran teknikan kaj lingvan maturecon.

— Laŭ la fluo de l' interparolo; Konversacia gvidlibro franca-Esperanta, Lucien Bourgois. Laroque Timbaut: Cercle espérantiste de l' Agenais, 1985. 88 p. Mimeo. 15 cm. SAT-Broŝur-servo. Alfabete ordigita franca-Esperanta frazaro.

— Monto, La, István Nemere (1944). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1984. 166 p. 20 cm. ISBN 963 571 140 9. La kvina facilstila originala romano de la konata verkisto, pri mistera malapero de kvar soldatoj kaj la deveno de la perforto.

— Programada teknologio, red. Péter Broczkó kaj Ilona Koutny. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio/Scienca Eldona Centro de UEA, 1984. 64 p. Ilus. 24 cm. N-ro 4 de nlternacia komputado. ISBN 963 571 137 9. Dek ses popularaj artikoloj pri aspektoj de la komputila programaro, aparte por mikrokomputiloj; kun anoncoj.

Ni funebras

— pro la forpaso de Wolfgang Göpel la 31an de marto 1985 en Wolmirstedt

Ni kore gratulas al

— d-ro Erich-Dieter Krause, membro de CE de GDREA, el Leipzig, kiu estis distingita la 5an de julio 1985 per la Johannes-R.-Becher-medalo en Arĝento,

— Rolf Beau, membro de CE de GDREA, el Leipzig, kiu estis distingita la 5an de julio 1985 per la Johannes-R.-Becher-medalo en Arĝento,

— Alfred Hoenigh el Leipzig, kiu ricevis la Johannes-R.-Becher-medalo en Bronze la 5an de julio 1985,

— Gerda Herold el Leipzig, kiu ricevis la Johannes-R.-Becher-medalo en Bronze la 5an de julio 1985.

KORESPONDDEZIROJ

Ni publikigos nur tajpitajn korresponddezirojn!

Bulgario

Oficistino, 30j., dez. kor. tutmonde kun virinoj pri literatur@, muziko, brodajoj, kol. bk: Veselka Nemceva, **5400 Sevlievo,** Panajot kovaca 3

Instruistino de Junulara E-Societo „Juneco" dez. kor. tutmonde (30j.), ankaŭ por gelernantoj (4a — 11a klaso) korespondamikoj estas serĉataj, skribu al: Maria Petkova Slaveva, **9700 Šumen,** Iskra 22

Činio

Bankoficisto, 24j., dez. kor. tutmonde: kun gejunuloj: pri fotografio, radio, lingvoj, kol. magazinoj, fotoj, bk, pm: Luo Liesi, Renmin-Lu 88, **Neijiang, Sichuan, 641000**

GDR

Ulrike Hoppe, **9075 Karl-Marx-Stadt,** Terrassenstr. 20, dez. kor. tutmonde pri literaturo, psikologio, muziko, lingvoj.

Roland Schroepf, **1720 Luduigsfelde,** Clara-Zetkin-Str. 3: dez. kor. tutmonde pri filatelio, pop-muziko, E-movado

Petra Balzer, **7560 Wilhelm-Pieck-Stadt Guben,** Cyrankieliczstr. 11, dez. kor. tutmonde pri muziko, turismo, literaturo, medicino, E-movado.

Hungario

Győző Császár, **7627 Pécs,** Körház tér 7, komencanto, dez. kor., kol. pm

Pollando

14j. lernantino, komencantino, dez. kor., kol. pm, bk: Aleksandra Belžek, ul. Dworcowa 12, **87-300 Brodnica.**

Gelernantoj de mezlernejo dez. kor. kun gejunuloj tutmonde: Esperanto-Klubo „Verda Amikeco", mgr. inĝ. Ubik Bouslaw, ul. Michalowicza 2/22, **43-323 Czechowice-Dziedzice**

Stanislaw Luźniak, Oŝ 700-lecia 1 m 26, **63-600 Krepno,** 42j., dez. kor. kol. pm, bk, librojn.

Soveta Unio

29j. inĝenierino dez. kor. tutmonde pri lingvoj, pinglolaboro, kol. bk: Gintare Liatukaite, p. k. 541, **232 024 Vilnius**

14j. knabo dez. kor. muziko, literaturo: Witalij Opjonkov, **Soči,** ul. Bitha 37, kv. 92

32j. pentristino dez. kor. tutmonde pri pentroarto, kulturo, muziko, turismo: Grajina Jaronyte, **234 640 Varena**

12 — 17j. gelernantoj dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Dvorec Pionerov Esperanto, **454 000 Čelabinsk**

Maria k Valdo Banaitis, **232 031 Nova Vilnia,** Pergales 26—35, 43j. kuracistoj, dez. kor. kolegoj el Orienteŭropo, Činio, pri psikiatrio, alkoholismo, poezio.

Membroj de E-klubo dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Esperanto-Klubo, **654 000 Novokuzneck,** ul. 25 let Oktjabrja 1, Inostrannij otdel biblioteki imeni Gogolja

21j. studentino pri fiziko dez. kor. kund geesp. el Bulgario, Hungario, Italio, Hispanio, p. ĉ. t., kol. bk, insignojn: Olga Bondarenko, **690 039 Vladivostok,** av., 100-letija 103, E-klubo

18j. studentino pri pedagogio dez. kor. kun gejunuloj p. ĉ. t. tutmonde, kol. pm, bk, librojn kalendaretojn: Irina Bunjkova, **690 039 Vladivostok,** av. 100-let Vladivostoku 103, E-klubo

22j. laboristo dez. kor. tutmonde pri popolaj proverboj, fabeloj kol. librojn: **690 039 Vladivostok,** av. 100-let Vladivostoku 103, E-klubo

22j. studento-radioteknikisto dez. kor. tutmonde p. ĉ. t. kun gejnunuloj pri vojaĝoj, kol. esperantajojn: Aleksandro Sĉerbakov, **690 039 Vladivostok,** av. 100-let Vladivostoku 103, E-klubo

24j. laboristo-komputisto-programisto dez. kor. pri ekonomio, kibernetiko kun gesam. el Japanio, Kanado, Usono, Aŭstralio, kol. librojn, bk: Vadim Sokolov, **690 035 Vladivostok,** av. 100-let Vladivostoku 103, E-klubo

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: 1080 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. sc. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. —
Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, 9400 Aue,
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16